Eldonaj aferoj: *Reza Haĝihasanlu*
Eksterlanda abono: *Hamze Ŝafii*

•

Adresoj:
✉P.O.Kesto 17765-184,
Tehran, Iran
✆(0098 21) 7437138
🖷(0098 21) 7463812
TTT-ejo : www.sabzandishan.com
Retpoŝto: info@sabzandishan.com

•

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuaĵoj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuaĵoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa.

Ĉia presa aŭ elektronika citado aŭ eldonado de materialoj de *IRANA ESPERANTISTO*, ĉu originale ĉu tradukite en aliajn lingvojn, estas permesata. Bonvole menciu pri la fonto kaj la originala lingvo (t.e. Esperanto aŭ la persa) kaj se eble, informu nin pri eldonaĵo en kiu aperis io de aŭ pri *IRANA ESPERANTISTO* aŭ/kaj sendu kopion al ni.

Enhavo:

paĝo

Redaktora noto: Irana kino kaj persa poezio 2
Poemeto: Nun Kriu! 2
Sinprezento: Reza Ĥejrĥah 3
Irana Kino: Kiel Kiseto 4
Literaturo: Kiam membron fortuno dolorigas ...9
Artikolo: Laborado de Tehranaj virinoj... 10
Poezio: L' Espero Kontinuas 12
Novelo: Murii Drinkejo 13
Artikolo: Rilato inter lingvo kaj skribo 16
Irana prozo: Deponado 19
Floroj el "la florejo" de Sadio 20
E-Centroj: Internacia Muzeo de Paco ... .22
Beletro: Historio de la koro 26
Turismo: Rio-de-Ĵanejro 27
Turismo: Tuso 28
Indekso: de la 1-a ĝis la 10-a numero 31

Persa parto :

Redakcia noto: angla aŭ Esperanto?..... 55
Ĉefartikolo: Pri William Auld..... 54
Elektita Parto de baldaŭ aperonta libro "Fenomeno Esperanto" far Ahmad Reza Mamduhi.
Esperanto Poezio: du elektitaj poemoj 52
Poemoj de William Auld tradukite al persa pere de D-ro Kejhan Sajjadpur kunekun la originala teksto.
Raporto: Du raportoj 51
Heinz Fischer, Nova prezidento de Aŭstrio subtenas Esperanton. Vietnama registaro honorigas Japana Esperanto Pac-defenda Asocio.
Artikolo: Mirindaj aspektoj de Esperanto ...49
S-ro Hosejn Alizade skribis eseeton pri la mirigaj aspektoj de la internacia lingvo.
Lingvaj homaj rajtoj 48
Traduko de la mesaĝo de uea-prezidanto pri lingvaj homaj rajtoj kiun tradukis f-ino Fahmi.
Noveleto: Eltrovo 46
S-ro Golam Reza Azarhuŝang tradukis noveleton de fama Esperantista aŭtoro Henri Paul Vatre
E-o en Irano laŭ UEA Jarlibro 44
Lasta parto de la mencioj de Reza Torabi pri la statistikoj pri Irano en la jarlibroj de uea.
Psikologiaj aspektoj de la internacia lingvo .41
La dua parto de la prelego de prof. Claude Piron kiun tradukis Asad Mahbub
E-Centroj de la mondo: Int. Muzeo de Paco 37
Persa traduko de la artikolo en paĝo 22. La tradukon faris f-ino Simin Emrani.
Historio de Esperanto en Irano 34
La dekunua parto de serio de interesaj artikoloj pri la pasinteco de E-movado en Irano far Ali Reza Doŭlatŝahi.
Indekso: De la 1-a ĝis la 10-a numero 32

Irana Kino kaj persa poezio

Karestimataj (ja: kar-estimataj, kaj ne: kares-timataj!) legantoj!

Irano, antikve nomita Persujo, famis/as je la lando de poezio kun gigantoj kiel Ferdoŭsio, Sadio, Hafezo, Moŭlana (Rumi), ... Plejeble tial aliajn artojn de Irano pli aŭ malpi regis/as poezio: ekzemple pentradon, kaliografion, ... kaj filmojn ĉiaspecajn – eĉ la dokumentajn! Probable por alikulturanoj tre strangas nun spekti dokumentan filmon, ekz-e pri arkitektuo aŭ botaniko, kies paroloj okulfrape (aŭ orelfrape!) poeziecas – kaj eĉ iam sekvas rimon, ritmon ktp.
Tio certe ne malbonas, se gxi ne tutkovras la aliajn aspektojn de la verko. Feliĉe en la nuntempa generacio de la iranaj artistoj utiligado de la riĉa poezio jam moderiĝis/as idealen. En nunaj kinfilmoj de Irano, la poezio tre bele kaj modere kunestas la kinartajn ecojn. Ĉinumere vi konatiĝas kun tre sukcesa reĝisoro el Irano: Bahman Farman-era. Ni intencas ĉiunumere prezenti prikinajn materialojn, sekve de la grandaj sukcesoj, kiujn renkontis la irana kino ankaŭ ekster la lando.
Bonan legadon – kaj spektadon!

Nun kriu!

Noktas, kriu damo! malvarma silento strila kio estas?
Voĉo estas voĉo, kiu restas, la kaŭzo fermi laringon kio estas?
Ĉiuj fenestroj viaj blindas, vi restas en via tombo
Kaj neniam komprenis lumradio, spegulo, luketo kio estas?
La flamo de sopirema himno el viaj okuloj bolas
Scias maldolĉa gorĝo via, la ploret-rompan guston kio estas?
Noktas, per via kant-fadeno, kudru la flagon ribelan
Alie resti kaj putri inter fadeno kaj kudrilo kio estas?
La tutan logikon de tiuj, kiuj al via sunsubiro ridas
Malkudris mi kaj ne komprenis malantaŭ ilia logiko, virino kio estas?
Freŝa kaj pluva aero disvolviĝas tra ĝardeno
En tiu ĉi vetero burĝona la kaŭzo fermi la fenestron kio estas?

Verkis S-ro Mohammad Ŝarif Saidi
Tradukis F-ino M. Fahmi



De Irano ĝis Tajvano
(Aventuroj de) mia vivo

Reza Ĥeirĥah

Mia patrina avo elmigris el Stalina Rusio al Irana Azerbajĝano, ĉar li ne ŝatis servi en ties armeo. Kaj miaj gepatroj elmigris el Azerbajĝano al Tehrano, kie mi naskiĝis en ties sudo. Kaj mi mem migris kaj vagadis diversajn landojn ĝis fine fiksiĝis en Tajvano, kie mi nun loĝas kun unu edzino kaj unu filineto (ambaŭ pli ol sufiĉaj), kiu espereble ne migru kiel patro, avo kaj praavoj!

Mia patrino diras ke mi tre subite decidis naskiĝi, tiel ke noktomeze puŝis ventron de patrino kaj jam post horoj estis en tiu ĉi mondo. Oni nomis min Reza, kiu signifas kontenta, eble prave.

*** lingva kaoso**

En miaj oreloj oni deklamis bapte versojn de Korano **arabe**; en mia familio ofte oni parolis **turke**; en mia ĉirkaŭo tre ofte mi uzis **persan** kaj en universitato mi studis **anglan**. **Esperanto** fariĝis mia ŝatata lingvo, dum universitata tempo, kaj dum 10 jaroj en Japanio, kiel profesia kaj nedungita Esperantisto mi envolviĝis kun tiu ĉi multopinie stranga lingvo. En sama lando mi devis studi **japanan lingvon** por povi vivi sendepende kaj nun en Tajvano mi baraktas kun **ĉina lingvo** kaj ties mortigaj 5 tonaj silaboj. Dum unujara restado en Eŭropo movad-rilate mi provis lerni hispanan kaj en Koreio pro ofta vojaĝo tien por instruo de Esperanto, mi lernis tiu-lingvan alfabeton. Tial nun mia cerbo ne plu povas elteni iun ajn novan lingvon.

***Rendevuo kun morto**

Dum kiam okazis revolucio kaj milito en Irano mi estis tie kaj iel partoprenis en ambaŭ eventoj foje vole kaj foje nevole kiel ĵurnalisto kaj scivolemulo. Mi estis savita el kelkaj akcidentoj ĉu pro malsano, ĉu pro proksimeco al tertremoj (en Irano kaj en Japanio) kaj ĉu pro novjara raporto el milit-fronto dum Irak-Irana milito. Anĝelo de morto ŝajne ŝatas min (se ne amus, feliĉe), kaj tamen ankoraŭ donas tempon al mi por fini mian mision, kiun ankoraŭ mi ne bone decidis kiu kaj kia ĝi estas.

***Riĉa malriĉulo**

Estas fakto ke mi preskaŭ ĉiam bone gajnis monon, kaj tamen pli bone uzis ĝin kaj tial ne vere iam ajn estis riĉa. Tamen pro tiu bonuzo, estas multaj kiuj konsideras min riĉa. Mi provas ne seniluziigi ilin. Feliĉe mia horoskopo diras ke mi en fina parto de mia vivo havos multe da mono kaj tial mi ne deziras esti iam ajn riĉa, ĉar tio signifas proksimecon de mia lasta tago, por kiu mi neniam estus vere preta.

***Esperanta vivo**

Mi hazarde renkontis Esperanton pere de anonco en ĵurnalo. Lernis ĝin de populara instruistino S-ino Sadigi en Tehran-universitato kaj poste pro inspiroj kaj instigoj de pioniro de Esperanto-movado en Irano, prof. Saheb Zamani (MHSZ) vojaĝis eksterlanden. En Irano dum multaj jaroj metis informojn pri ĝi en kelkaj gazetoj popularaj kaj eksterlande instruis ĝin en multaj landoj ĝis nun.

La unuan songazeton de Azio kun nomo Najtingalo mi aperigis en 10 numeroj dum restado en Japanio (1990-2000). Mi verkis libron pri mia 72taga vojaĝo tra Japanio (Leteroj el Japanio) kaj skribis multajn artikolojn kaj raportojn pri Esperantaj aferoj. Kun kelkaj alilandanoj kaj japanoj ni faris la video-filmon *En Somera Vilao* (Ŝajne la unua en Azio), pri kio Japan Times ĉiutaga angla ĵurnalo faris duonpaĝan raporton.

***Kaj en Tajvano**

Nune en Tajvano mi vivtenas per angla lingvo kaj disvastigas la internacian lingvon en sudo, kie kiam mi venis estis pura dezerto movade. Pro kresko de Esperanto-kursoj (nun dek) ĉi tie kaj pro pagigo de studentoj (kiuj pli serioze lernas ol antaŭaj kiuj senpage aŭ malkare lernis), mi havas esperon ree fariĝi profesia E-instruisto. Cetere, mi gvidas la unuan oficialan E-kurson en mezalta lernejo en Tajvano.

***Ŝatoj, hobioj**

Mi ŝatas kinojn de Kurosawa Akira, eble senkonscie pro tio ke mi mem samuraje vivas, aparte movade. Antaŭe legis librojn, nun legas leterojn de interreto. Antaŭe faris jogon kaj grimpis montojn kaj nun ŝatas sidi kaj mediti (fenomeno rilate al aĝo). Antaŭe ne povis forgesi aferojn kaj nun ne povas memori ilin. Tial mi nun ŝatas notadon kaj pli ol antaŭe skribas taglibron (mia hobio de aĝo 10).

Laste, mi ŝatas korespondi, sed nur kun tiuj kiuj ne postulas tujan (aŭ eĉ tutan) respondon kaj tiuj kiuj post mia nerespondo resendas la leterojn.

Rezamenhof@yahoo.com
http://kheirkhah.tripod.com

Kiel Kiseto

Bahman Farman-ara, refloranta reĝisoro

En siaj lastaj filmoj, Bahman Farman-ara defias morton tre diverse, ekz-e: Se via konscienco estas komforta, morto estas kiel kiseto.

Bahman Farman-ara, unu el la plej sukcesaj reĝisoroj de la nuntempa irano, ne permesatis fari filmon en Irano dum pli ol 20 jaroj, tamen kiam oni permesis al li produkti filmon, liaj verkoj tiel sukceso-plenis, ke ili gajnis ankaŭ la enlandajn premiojn plej altajn.
Kvankam ĉefkarakteroj de liaj filmoj pleje estas de la sociaj altklasanoj – kio sendube konsistigas plejmalmulton en Irano, kaj al kio li mem apartenas – tamen ankaŭ aliklasanoj de la irana socio, eĉ la plej malaltaj, estas bone elmontritaj en liaj verkoj.

La Red.

Enkonduko

Irana kino ĉefe ekfloris post la islama revolucio (1979), kvankam ties radikojn oni ja povas trovi en la antaŭrevolucia kinarto de la lando. Ne multaj filmistoj renkontis sukceson kaj antaŭ kaj post la revolucio. Bahman Farman-ara (1941-) certe apartenas al la malmulto, kvankam li ne ĝuis permeson fari filmon en Irano por pli ol 20 jaroj ekde la revolucio. Tamen dum la dukekjaro li daŭrigis sian aktivadon en kinindustrio ekster la patrujo, i.a kunlaborante kun kanadaj kaj usona kinkompanioj. Tiu ĉi artikoleto unue prezentas lian artan biografieton en tri distingeblaj periodoj, kaj poste traktas liajn plej lastajn filmojn – eble la plej sukcesajn – iomete pli detale kaj provas elmontri lian ĉefan pripensaĵon dum la lasta periodo de lia kariero: defii la morton tre diverse.

Tri distingeblaj periodoj

Naskiĝinte meze de tre gravaj ŝanĝoj en Irano, nome en 1941, dum la dua mondmilito kaj ekokupiĝo de la lando per anglaj kaj rusaj armeoj, kaj en jaro kiam Reza-ŝaho (1877-1944) anstataŭiĝis per la filo Mohammad Reza-ŝaho (1919-1980), li komencis sian vivon en lando, kies plej ĉefajn ŝanĝojn de la nuntempa historio li estis travivonta. Li edukiĝis dum la regado de la lasta ŝaho de Irano, kaj 16-jaraĝe iris al Anglio por studi en la Lernejo de Muzikaj kaj Dramaj Artoj de Londono por du jaroj. De tie li iris al Usono por daŭigi la studadon pri kinarto en la Universitato de Suda Kalifornio por 8 jaroj. Tiam li revenis al sia lando por komenci sian unuan periodon de kinaktivado ĝis la revolucio. Post revolucio li iris al Kanado kaj Usono, kio konsistigas lian duan parton de kariero, kaj fine li revenis al Irano por eki sian 3-a-periodan karieron. Jene ni rigardas al tiuj ĉi tri distingeblaj labor-periodoj kaj ties apartaj produktoj.



Farman-ara, spertinte kaj vivinte tri tre diversajn mediojn – t.e. antaŭrevolucia Irano, eksterlando (Kanado kaj Usono) kaj postrevolucia Irano – alfrontis kinarton en tri apartaj sintenadoj.

1- Antaŭ revolucio (en Irano)

Post fini sian studadon en Anglujo kaj Usono, reveninte al Irano, Farman-ara unue verkis filmrecenzojn por tagĵurnalo *Tehran journal* kaj samtempe dum 1968-1974 produktis kaj prezentis programon por la Nacia Televido de Irano nomata *fanuse ĥijal* (Lanterno de Fantazio) kaj instruis en la Altlernejo pri Televido kaj Kino.

Dum 1968-9, li faris tri mallongajn dokumentajn filmojn nomataj *Noŭruzo ĥavijar* (Noŭruzo kaj kaviaro), *Tehrane noŭ va kohne* (Nova kaj malnova Tehrano) kaj *Tehran va Noŭruz* (Tehrano kaj Noŭruzo).
Post tre sukcesa televidserio nomata *Ĥaneje Gamar-ĥanum* (Domo de sinjorino Gamar), li faris kinfilmon pri ĝi (1972), kiu malsukcesis komerce. Li tre klare konfesis ke li deviĝis fari tion pro financaj bezonoj kaj tio estis eraro lia:
"Dekomence mi pentiĝis, kompreneble jam ne eblis forlasi la projekton; sed almenaŭ mi povintus ne meti mian nomon por la filmo,

kaj la kialo por ankoraŭ meti mian nomon, estas tio, ke mi kredas ke oni ne devas kaŝi la erarojn for de la spektantoj."

En 1974 Farman-ara kune kun Huŝang Golŝiri (1938-2000), unu el la renomaj verkistoj de Irano, verkis scenaron, kaj reĝisoris kinfilmon sukcesoplenan, kiu famigis ilin ankaŭ ekster Irano: *Ŝazde Ehteĝab* (Princo Ehteĝab). Ĝi estis surbaze de samtitola romano de Golŝiri, kio jam tradukiĝis en multajn lingvojn. Temas pri lasta princo de Gaĝaridoj (1795-1925), la antaŭlasta reĝa dinastio de Irano, kaj la tempaj kompleksaj interrilatoj de la reĝa familio. Princo Ehteĝab (kiun rolis nun veterana aktoro Ĝamŝid Maŝajeĥi), mortante pro hereda malsano, malliberigis sin en sian palacon. Lin atakadas la memoroj kaj malbonfaroj de liaj antaŭuloj. La proksimuloj ne povas kompreni kial al li mankas la ecoj de liaj prapatroj. Lin vizitas la spiritoj de liaj prapatroj, riproĉante lin pro tio, ke li ne sekvas ilia-stile la dinastion.

En la 3-a Internacia Film-Festivalo de Tehrano (1974), la filmo (nigra-blanka kaj 93-minuta) rekoniĝis kiel la plej bona verko kaj gajnis la Statuon de la Ora Flugilhava Kapro. Ĝi surekraniĝis ankaŭ en eksterlandaj festivaloj, kaj kritikisto de Variety skribis, ke: "Farman-ara estas unu el la plej bonaj reĝisoroj junaj de estonta Irano". En 1976 li faris filmon nomata *Ŝatranĝe Bad* (Ŝako de vento). Lia pli posta kinfilmo, kiu evidente estis simbola verko, kaŭzis problemojn por li kaj antaŭ kaj post la revolucio. Ĝi nomiĝis *Saje-haje bolande bad* (Longaj ombroj de la vento) kaj produktiĝis ĵus antaŭ la revolucio en 1978. Denove ĝian scenaron kunverkis Farman-ara kaj Golŝiri surbaze de romano far la lasta, nomata *Ma'sume avval* (La unua senpekulo), kies celo estis elmontrado de superstiĉoj kaj timo de la naturaj nekonaĵoj. Liaj lastaj aktivadoj antaŭ forlasi Iranon, inkluzivis distribuadon de kelkaj eksterlandaj revolucifilmoj.

2- Post revolucio (ekster Irano)

Post forlaso de Irano, Farman-ara loĝis kaj laboris en Kanado (Vankuvero) kiel direktoro de kompanioj Cinema Circle kaj Spectrafilm, kaj en Usono kiel vicdirektoro de kompanio Cine Plex por produktado kaj distribuado de filmoj. I.a. temis pri filmoj de François Truffaut, Jean-Luc Godard kaj Billie August.

3- Post revolucio (en Irano)

En 1990 Farman-ara revenis al Irano kaj ekinstruis en la Art-Universitato. Dum dek jaroj li verkis 10 scenarojn kaj petis permeson de la irana registaro por fari filmon el ili, tamen ĉiuj dek ne ricevis la permeson. I.a. li verkis skeĉon nomata *Az Abbase Kiarostami motenafferam* (Mi malamas Abbas Kiarostami), kiu ne filmiĝis. Iam poste en intervjuo li diris: "La argentina verkisto Jorge Luis Borges nomis cenzuron 'la patrino de ĉiuj metaforoj', ĉar ĝi estigas novan lingv(aĵ)on por diri kion vi intencas". Kiam li prezentis la 11-an scenaron, oni donis al li permeson fari filmon el ĝi. "Eble ĉar ĝi temis pri morto de mi mem", poste li divenis en intervjuo. Do, en 1999 li faris sian unuan kinfilmon de post la revolucio, post pasado de pli ol dudekjara malpermesado fari filmon en Irano. Tamen lia filmo gajnis multajn premiojn eĉ en la lando. Ĝi nomiĝis *Buje kafur, atre jas* (Odoro de kamforo, aromo de jasmeno), kaj fariĝis unua parto de trilogio alloga rilate al i.a defii la morton, krom la sociaj kaj politikaj aferoj. La ĉefkaraktero de la filmo estas Bahman Farĝami, kiu prezentinte siajn scenarojn por ricevi permeson por fari filmon el ili, ĉiam ricevas neon. Bahman Farman-ara mem rolis lin en la filmo, kio i.a. servas kiel lia membiografio. En intervjuo li diris: "Mi volis

Se via konscienco estas komforta, morto estas kiel kiseto.

Unu filmo en ok framoj:

Kiel Kiseto



Esmail Ŝebli:
"Cu tio eblas, ke oni vidu maljuston kaj nenion diru?"



Mohammad Reza Sadio:
"En la brakoj de mia edzino, mi ploris por mia amatino."



Nur Gahan:
"Pardonon sinjoro Ŝebli, ĉu vi havas sukeron?

Parvane:
"Al kiu ajn mi edziniĝintus, tiu ne estus tiom bona, kiel vi."

ke tiu ĉi filmo estu la historio de generacio de artistoj. Mi ne povis labori por multaj jaroj, sed ekzistis multaj aliaj kiel mi."

Ĉiuj tri kinfilmoj de li en tiu ĉi periodo havas vivon kaj morton kiel sian ĉeftemon, kvankam ĉee ekzistas ankaŭ sociaj kaj politikaj aludoj kaj elmontroj. Jene ni notas ilin tri kronologie.

1- Odoro de kamforo, aromo de jasmeno

En tiu ĉi filmo Farman-ara elmontras pri la malfacilaj longaj jaroj, dum kiuj li kaj liaj amikoj-kolegoj ne havis permeson fari filmon pro kialoj neklarigitaj al ili. Kvankam dum pli ol dudek jaroj li ne estis reĝisorinta iun ajn verkon, tamen la filmo estis tiel bone farita diversvidpunkte. En la Internacia Film-Festivalo de Tehrano (1999) lia verko gajnis sep premiojn, i.a. por la plej bonaj scenaro, reĝisoro kaj filmo.

La filmo surekraniĝis ankaŭ en eksterlandaj filmfestivaloj, ekz-e en la 44-a Sankt-Fransiska Internacia Festivalo, kiun ĉeestis Farman-ara 59-jar-aĝe. Kaj tie en intervjuo:

Demando: *Odoro de Kamforo jam gajnis plurajn premiojn. Kiom kontentiga tio estas por vi ekĝui tian akcepton post 22-jara ne-laborado?*

Farman-ara: *Nu, vi scias, ke tio estas tre tre kontentiga, sed la plej plaĉa parto de ĝi estas tio, ke la filmo estis sukceso komerce en mia lando kaj la junuloj jam bone respondis al ĝi. Tio estis la plej miriga, ĉar mi atendis ke la homoj de mia generacio ekhavu rilaton kun ĝi, ĉar vere mi estas dirinta ilian historion. Sed en la Irana Film-Festivalo mi vidis junan viron, kiu estis spektanta la filmon por la kvara fojo. Do mi demandis lin, "Vere kio en la filmo plaĉis al vi? Ĉar mi scias ke tio estas via generacio, kio venas al la filmo." Kaj li respondis: "Numero unu: dum unu kaj duon-horo, vi instruis al ni 20 jarojn de nia historio." ...*

Mi ĉiam similigas (premiojn kaj honorigojn) al la kremo, kion oni ŝmiras sur la kukon. La filmo estas la kuko. Mia kuko estas fari filmon por mia lando kaj la popolo. Se aliaj popoloj ŝatas ĝin, tio estas bonege, sed mi ne eksvenos se – jen! – festivalo de reĝisoroj ne ŝatas mian postan filmon; ĝis kiam mi povas fari ilin por la popoloj de mia lando."

En la 1-a parto de la filmo, kio nomiĝas "Malbona tago", kiam li iras al la tombejo pro la datreveno de la morto de la edzino, li ekkomprenas ke la tombon, kiun li estis rezervinta por si mem, ĉe la edzino, oni jam okupis! Revenante el la

Odoro de kamforo, aromo de jasmeno (1999, 93 minutojn longa)	
verkinto kaj reĝisoro:	Bahman Farman-ara
Geaktoroj:	Bahman Farĝami: Bahman Farman-ara Lia kuracisto-amiko: Reza Kijanijan Juna virino formetinta mortnaskiton en lian aŭton: Roja Noŭnahali Lia malnova amiko-aktoro: Vali-ol-lah Ŝirandami Firuz Behĝat Mohammadi, Hosejn Kasbian Mahtaĝ Noĝumi, Ebrahim Abadi

Ĵale:
"Mi diris al tiu: 'Ĉar via patro malamas sin, li amas neniun.'"

S-ino Basiri:
"Kiom da kanarioj vi konas, kiuj povas ludi sonaton de Bethoveno?"



Naser-ed-din: *"Patrujo ne estas io, kion oni povas forgesi."*

Ŝejko Hasan:
"Kompreneble ankoraŭ ekzistas bonaj homoj; nur la tempo estas malbona tempo."

tombejo li ektrovas ke virino, kiun li enaŭtigis survoje al la tombejo, kaj kiu timis de reiri al sia kolerema edzo, estas formetinta sian mortnaskitan bebon en la malantaŭo de lia aŭto. Morto vidiĝas ankaŭ en aliaj vizaĝoj: ekz-e japana televido demandis lin fari filmon pri la ritaĵoj de funbrado en Irano. Krome, li mem jam havis du koratakojn. Li ĉiusemajne vizitas sian patrinon, kiu paraliziĝis, perdis la memoron kaj ne povas paroli. Li ĉiam relegas historiojn, kiujn ŝi legis por li infanaĝe, ĉar li esperas ke tiel ŝi iam ekrehavos sian memoron.

En intervjuo li diris: "En mia aĝo (tiam 59-jaraĝo), pensi pri morto estas nature, kaj de longe antaŭe ekzistis kulturo pri morto en Irano, tiel, ke ĝi jam fariĝis parto de ĉio, kion vi faras."

Aristotelo (384-322 a.K.) nomis antonimon kiel unu el la asociiloj. Ekz-e kiam oni aŭdas "tago"n, ĝi asocias ankaŭ la kontraŭon, t.e. "nokto"n por oni. Samo validas pri vivo kaj morto. Krome, morton ankaŭ difinas vivo, kaj inverse. En la nomo de la filmo "odoro de kamforo" simbolas morton kaj "aromo de jasmeno" prialudas vivon.

2- Domo sur la akvo

En sia dua postrevolucia filmo, nomata *Ĥanei ruje ab* (Domo sur la akvo), Farman-ara daŭrigis pri temoj kaj etoso similaj al la antaŭa kinfilmo **Odoro de kamforo, aromo de jasmeno** tamen neniel ripetece. Ĝi ĝuis tute alian atmosferon kaj formon. Ambaŭ rilatiĝis al morto, sed ĉiu aliel.

Komence de la filmo la ĉefa karaktero dum akcidento per sia aŭto survoje, vundas anĝeleton. Do la spektantoj dekomence komprenas, ke temas pri surreala kaj mistikeca verko. Tamen ne multon oni spektos tiel; pli ol 90% spegulas nur tuŝeblajn realaĵojn. Li, d-ro Sepid-baĥt (laŭlitere: *blank-estontulo* aŭ *bonfina*), mezaĝa ginekologo, havas bonajn, nebonajn kaj malbonajn ecojn – plejeble kiel plejmulto de ĉiuj ni homoj. Sepid-baĥt kun pasintaj eraroj kaj estanta soleco hazarde konatiĝas kun okjara knabo, kiu parkeras la tutuon de La Nobla Korano kaj kiu ekenkomatiĝas. Eble tial unue la nomo de la filmo estis Komato kaj en intervjuo Farman-ara priskribis la tiam

"Vivi sen espero estas kiel konstrui domon sur la akvo."
Frapfrazo de Bahman Farman-ara por la filmo

estontan filmon kiel "la historio de socio en kolektiva komato".

La d-ro, kiu nun spertas "liberan falon en la vivo", pasinte ekz-e kaŭzis nenaskivecon al sia sekretariino-amatino, kiu neniel pardonivas lin pro tio, kion li faris al ŝi, kiam ŝi estis eĉ pli juna. Inter la sociaj problemoj, pri kiuj la filmo elmontras estas: narkotismo de junuloj, prostituo kaj aidoso. Ie en la filmo la d-ro responde al iu, kiu lin nomis sia lasta espero, diras: "Ni estas en feka mondo, kiam *mi estas* ies lasta espero." Okcidentaj filmkritikistoj jam komparis iujn socisatirajn (p)ecojn de la filmoj de Farman-ara kun tiuj de Woody Allen.

La d-ro ankoraŭ simpatias kun sia alia eksamatino, kiu nun estas ĉefflegistino kaj pasigas kemi-terapion pro la severa malsano; kun juna knabino, kiu ĵus komprenis ke suferas de aideso; kaj kun sia filo, kiu suferas narkotismon.

“Kiam filmisto ne faras filmon,
aŭ verkisto ne verkas, tio estas morto.”
Frazo de la ĉefkaraktero de la filmo
“Mi ne timas de morto. Mi timas de vana vivado.”
Frapfrazo de Bahman Farman-ara por la filmo

Domo sur la akvo (2001, 111 minutojn longa)	
Verkinto kaj reĝisoro:	Bahman Farman-ara
Geaktoroj:	D-ro Sepidbaĥt: Reza Kijanijan D-ra patro: Ezzat-ol-lah Entezami D-ra filo, Mani: Mehdi Safavi D-ra sekretariino: Hedje Tehrani Ĉefflegistino: Bita Farrahi Knabino kun aidoso: Behnaz Ĝafari

Kiel kiseto (2005)	
Verkinto kaj reĝisoro:	Bahman Farman-ara
Geaktoroj:	Esmail Ŝebli: Ĝamŝid Maŝajeĥi Mohammad Reza Sadio: Reza Kijanijan Nur-Ĝahan (Mondlumo): Hedje Tehrani S-ro Kamal: Ĝamŝid Haŝem-pur Parvane: Fateme Motamed-Arija Ĵale: Faĥri Ĥorvaŝ S-ino Basiri: Marjam Saadat Ali Doroŝke-ĉi (Kaleŝisto): Huŝang Harir-ĉijan Kapitano Kolali: Mehdi Safavi Amir Hosejn: Babak Hamidijan Ĝuĝe Ĝavad (Ĝavad-kokido): Hedajat Haŝemi Naser-ed-din: Pajam Dehkordi Ŝejko Hasan: Esmail Pur-reza

Ankaŭ tiu ĉi filmo tre plaĉis al la juĝistoj de la Internacia Film-Festivalo de Tehrano (2002) kaj gajnis multajn premiojn, i.a. por plej bona irana filmo kaj plej bona aktoro (Reza Kijanijan).

3- Kiel kiseto

La plej nova kinfilmo de Farman-ara, nomata *Jek buse kuĉulu* (laŭlitere: Unu eta kiso, aŭ Kiel kiseto) ne surekraniĝis dum la Internacia Film-Festivalo de Tehrano (2005), tamen ĝia broŝureto disdoniĝis dum la festivalo.

Sur antŭaj du paĝoj vi povas trovi ok framojn de la filmo elektitaj el la broŝuro kaj tiel gustumeti la filmetoson, kiu laŭŝajne ankoraŭ ĝuas preferatan demandojn de Farman-ara, kiel la lastaj du, pri la ekzistado kaj morto, krom la ĉeaj sociaj kaj politikaj aferoj.★

Fontoj:

BAHARLU, Abbas. *Sad ĉehreje sinemaje Iran* (Cent vizaĝoj de Irana kino), Tehrano: Naŝre gatre, 2002, 208 p.
http://www.eye.net/eye/issue
http://www.golshirifoundation.org
http://www.nyu.edu/greyart/exhibits/iran
http://citypaper.net/movies/s/smellofcamphor.shtml
http://www.videoflicks.ca/titles/1101/1101291.htm
http://www.reel.com/reel.asp?node=features/interviews/farmanara
http://www.1worldfilms.com/iran/princeehtejab.htm
http://www.filmref.com/directors/dirpages/farmanara.html

Verkis :Ŝima Bastani

Kiam membron Fortuno dolorigas[1]

La kapo diris: «Kial anstataŭ ĉiuj korpopartoj mi devas pensi? Aliaj partoj mem pensu por si mem. Kial mi enpeniĝu?»

La manoj diris: «Ni volas labori por ni mem; se la kapo volas meti manĝaĵon en sian buŝon, li mem devas fari tion, ankaŭ se la postaĵo volas taharati*[2], li mem faru tion.»

La piedoj diris: «Kial ni devas porti la grandaĉan korpon dum la tuta vivo? Ni jam laciĝis de tio. Se la korpego forestu, ni povas komforte supreniri la ŝtupojn, grimpi la montojn kaj facile iri kien ajn ni deziras.»

Iun matenon, la kapo, la manoj kaj la piedoj forlasis la korpegon sur la teron kaj ĉiu el ili anoncis sian sendependiĝon, kaj ĉar ili ne havis najbaron, ili ne povis demandi ilian agnoskon pri sia sendendeco.

Kompreneble la afero ne finiĝis tie.

La okuloj diris: «Tiu kapaĉo, se volas vidi ion, li mem vidu ĝin, kial ni devas fari tion anstataŭ ĝi?»

La oreloj diris: «Same, se la kapaĉo volas aŭdi ion, li mem aŭdu ĝin, tio neniel rilatas al ni.»

La nazo diris: «Tio ne rilatas al mi, ke la senutila kapo volas flari odorojn.»

Iun matenon, la nazo, la okuloj kaj la oreloj forĵetis la kapon en angulon kaj anoncis la sendependiĝon. Ankaŭ la haroj estis anoncintaj sian sendependecon antaŭ la lastatempaj okazaĵoj, kaj neniu sciis kien ili irintas.

Nek tie finiĝis la afero.

Unu piedo diris al la alia: «Kial kiun ajn vojon vi iras, ankaŭ mi devas iri? Vi iru vian vojoin, kaj mi la mian.»

Unu mano diris al la alia: «Vi eble deziras pendiĝi de la busa manilo, mi ne devas imiti vin.»

Unu okulo diris al la alia: «Se vi deziras vidi televidajn programojn, vi ja povas fari tion, sed mi deziras vidi videon kaj satelit-programojn.»

Unu orelo diris al la alia: «Se vi deziras aŭskulti tradician muzikon, mi deziras aŭskulti al ĵazmuziko.»

Iun matenon ankaŭ la okuloj, la oreloj, la manoj kaj la piedoj anoncis sian sendependiĝon kaj ĉiu el ili foriris ien.

Nun ni ne scias, ke ĉu la afero finiĝis tie aŭ ne.

Piednotoj :

1- Verso el fama poemo de Sadio (1184 - 1281):

"*Membroj de sama korpo estas l' adamidoj*
Ĉar el sama gemo ili estas kreitoj
Kiam membron Fortuno dolorigas
La aliajn tio maltrankviligas"

2- Taharato = arabdevena vorto laŭlitere "pureco", en Islamo signifas lavadon permanan de koncerna korpoparto post urinado aŭ fekado.

Fontoj:

SALAHI, Omran. "*Ĉo ozvi be dard avarad Ruzegar*" (Kiam membron Fortuno dolorigas), aperinta en Kelk ("Kan(plumo)" perslingva monatrevuo kultura, arta kaj socia), N-ro 154, majo kaj junio 2005, 60p., p.50.

Foto: far Masud Sohejli el: www.masoudsoheili.com/IranArt-Writers/OmranSalahi.jpg

Desegnaĵo: far Raha Jazdan-dust, el: Kelk

Verkis : (s-ro) **Omran Salahi**
Tradukis : (s-ino) **Ŝima Bastani**

Laborado de Tehranaj virinoj kaj ĝia efekto sur ilia sanstato[1]

Ŝirin Ahmad-Nia*

Ekde 1970-a jardeko sociologoj priesploras la diferencojn de la sanstato de homgrupoj precipe tiun relate al viroj kaj virinoj el la vidpunkto de sociaj sciencoj. Ĝenerale, estas konate ke la vivo-daŭro de virinoj estas pli longa ol tiu de viroj, sed virinoj ĝenerale suferas pli grandan nivelon de malsano komopare al viroj. Do, tiu pluvivado estas ofte plenplena de peno kaj sanproblemoj. La esploroj pri la efektoj de socio-ekonomiaj faktoroj sur la sanstato de homoj plejparte jam koncentriĝis en la okcidentaj socioj, kaj tia esplorado en aliaj mondpartoj nur lastatempe komenciĝis. Tiu ĉi artikolo temas pri unu el raraj esploroj okazinta en Irano, kiu rigardis al la sanstato-diferenco inter laborantaj kaj ne-laborantaj patrinoj en la ĉefurbo de Irano, alivorte pririgardis la efekton de laborado kiel unu el la faktoroj kiu povus afekti virinan sanstaton positive aŭ negative.

Irano estas konsiderata kiel unu el la industriiĝantaj landoj en Azio, el kies popolo 61.3 percentoj estas urbanoj laŭ la plej lasta nacinivela popol-nombrado en 1996. En Irano la percento de virinoj, kiuj laboras eksterhejme ankoraŭ ne altas (nur ĉirkau 9 percentoj en 1996), tamen la percento de alfabetaj virinoj lastatempe alproksimiĝis 80 percentojn kaj la percento de studentinoj en iranaj universitatoj kreskis al 36 percentoj en 1996. Pro tiuj ŝanĝoj oni antaŭvidas plimultan ŝancon por virinoj por enirado en labormerkaton de Irano iompostiome malgraŭ la kulturaj malhelpoj, kiuj ĉiuokaze ekzistas en la socio.

Sociologie la roloj de virino en socio, dividiĝas al du ĉefaj roloj, unu de la t.n. tradiciaj roloj (de edzino kaj patrino) kaj la alia kiu estas la nova rolo de laboranto eksterhejma. Laŭ iuj ekzistantaj sociologiaj teorioj koncerne al la virinaj roloj, aldoniĝo de la nova rolo de virinoj al iliaj tradiciaj roloj pozitive efikas al ilia sanstato. Tiuj laboradaj teorioj aludas al profitoj de laborado por virinoj kiel ekzemplo gajno de mono (do sekve pliboniĝo de materiaj kondiĉoj de ilia vivo), pli da mem-fido kaj mem-estimado, pli da socia subteno, kiuj kune donas eĉ pli da profitoj al virinoj, kiuj laboras. Aliflanke, estas negative alrigardo al la situacio, tiel ke iuj kredas aldoniĝo de plia rolo kaŭzos pli da labor-peno, pli granda demando al/kaj atendoj de ili, pli multa respondeco, kaj pli da premoj, kio entute kaŭzus troan ŝarĝon sur la ŝultrojn de virinoj kaj rezulte malbonefikos al ilia sanstato. La rezultoj de ĝisnunaj esploroj tiurilate jam

Kial iranaj laborantaj virinoj laboras?

Kialo	Elcentoj de respondoj
Subteni la familion finance	25.5
Persone ŝatas labori	22.3
Pro sociemo	20.5
Por esti ekonomie sendependa	19.7
Pro akirita edukado	10.6
Aliaj kaŭzoj	1.4

[1] Surbaze de artikolo "Women's work and health in Iran: a comparison of working and non-working mothers", far la sama aŭtoro aperrinta en la ĵurnalo Social Science & Medicine, Elsevier Science Ltd. Vol. 54 (2002) pp. 753-765.

subtenis la pozitivan alrigardon t.e. en okcideto la sanstato de laborantaj virinoj kompare al tiuj, kiuj estas nur dommastrinoj pruviĝis plibona.

Mi decidis efektivigi esploron pri la efekto de laborado al virina sanstato en Irano, kie la kulturo grandparte malsamas ol tiu de okcidento kaj ĉar tiaj esploroj jam mankis al nia socio. En nia socio ankoraŭ multaj kun suspekto rigardas al la neceso de virina laborado eksterhejme kaj multaj tradiciemaj homoj preferus ke virinoj gravigu siajn tradiciajn rolojn ol labori ekster-hejme.

Mi kondukis esploron, kiu prikonsideris tri ĉefajn faktoro-grupojn rilate al la sanstato de virinoj laŭ la elementoj de priparolitaj teorioj. Tiuj grupoj estis socio-demografiaj karakterizaĵoj (kiel ekzemplo edukado-nivelo, kaj aĝo), labor-kondiĉoj (ezemple labori tut-tempe aŭ part-tempe, kaj nivelo de salajro), kaj personeca kaj vivo-kondiĉaj faktoroj (kiel memfido, premo-nivelo, edzo-subtenada nivelo, ...), kiuj havus efikojn sur la psikan kaj fizikan sanstaton de virinoj. Mi preparis demandaron laŭ la principoj de sociologia studado kaj teknikoj kaj demandis al 1065 patrinoj en Tehrano: 710 laborantaj kaj 355 ne-laborantaj, kiuj estis elektitaj surbaze de sciencaj elekto-metodoj. La specimeno konsistis el virinoj, kiuj estis edziniĝintaj kaj havis almenaŭ unu infanon. Interese laŭ la akiritaj statistkoj, la averaĝa aĝo de edziniĝo de laborantaj patrinoj (22 jaroj) estis signife pli alta ol tiu de nur dommastrinoj (18.7 jaroj), simile ilia aĝo de la unua gravediĝo (23.9 jaraĝo) estis ankaŭ pli alta ol tiu de dommastrinoj (20.5 jaraĝp), kaj pli grave, eĉ la mez-nombro de edukado-jaroj (12.9 jaroj) ankaŭ estis ne-surprize signife pli granda ol tiu de nur-dommastrinoj (kies estis nur 9.5 jaroj).

Ne indus ĉi tie detale priparoli la rezultojn de diversaspektaj statistkaj proceduroj surbaze de la datenoj de la esploro, do jen nur la ĉefaj rezultoj, kiuj povus interesi la legantojn.

Mi celis scii ĉu estas statistike signifa diferenco inter la sanstato de la laborantaj kaj ne-laborantaj patrinoj en Tehrano. Laŭ la rezulto de la esploro, nek rilate al la psika sanstato, nek rilate al la fizika sanstato ne troviĝis signifa malsameco inter la du ĉefaj grupoj de la virinoj konsiderante ĉiujn potenciale ekzistantajn faktorojn. Tio montris ke se la laborado ne havas pozitivan efikon al la sanstato de virinoj, tio almenaŭ nek havis malbonefikon ankaŭ al ilia stato. Ĉar la efiko de laboro povas esti tre kompleksa laŭ la diversaj kondiĉoj de la laborado, la karakterizaĵoj de la laborado kaj aliaj koncernaj variantoj analiziĝis aparte, kaj la rezultoj montris, ke la elementoj de ambaŭ pozitiva kaj negativa alrigardoj al laborado-rolo de virinoj signife efikis al la sanstato de virinoj. Rezulte oni konkludis ke la efiko de iu kontraŭ-balanco kaŭzis ke la pozitiva efiko de laborado-rolo, estu kovrita aŭ nuligita pere de la negativaj efikoj ĉeestantaj en la proceduro. Alivorte mi trovis ke ekzemple laborantaj virinoj ĝuis pli altan memfidon, socian subtenon, pli da financa memstareco, kaj pli multe kontentis de la vivo sia, tamen samtempe ili malĝuis ankaŭ pli da premo kaj sento de rolo-konflikto! Tia situacio klare estas rilatanta al la kulturaj karakterizaĵoj de la socio, kie oni (kaj precipe virinoj mem) rigardas la tradiciajn rolojn de virino (ekzemple rilate al prizorgado de infano) multe pli gravaj, valoroplenaj kaj urĝaj compare al la taskoj kaj devoj de virinoj relate al la laborejo eksterhejma. Tiuj laborantaj patrinoj, kiuj respondis em-antaj al forlasado de sia laborado-rolo, esprimis la kialon: la sento esti ne taŭgaj aŭ kulpantaj patrinoj. Iuj aliaj virinoj sentis malkontenton pri laborado ĉar iliaj edzoj ne subtenis ilian labor-rolon kaj plendis kontraŭ ilia laborado.

La rezulto de la esploro plue montris ke ĝenerale la labor-kondiĉoj signife efikis al la virina sanstato pli-malpli samkiel en la okcidentaj socioj, ekzemple virinoj el pli altaj labor-klasoj raportis pli bonajn sanstatojn kompare al tiuj de malaltnivelaj labor-klasoj/ kategorioj. Virinoj, kiuj laboris parttempe ĝuis pli bonan sanstaton ol tiuj laborantaj plentempe.★

*D-ino pri Medicina Sociologio
Allameh-Tabatabai Universitato de Tehrano
s_ahmadnia@hotmail.com

L' Espero kontinuas

امید[1] تداوم می‌یابد!

Espero ankoraŭ disvastiĝas
ene de l' koroj de l' homoj
kiuj laboras en la voj'
de l' am' kaj amikec'!

امید فرا می‌گسترد هنوز
در قلب‌های مردمانی که
در راه عشق کار می کنند و دوستی!

La ide' ne ankoraŭ venkis,
La malhelpoj ne jam mankis,
Ekde la komenc',
Ni ne forgesu!

این ایده پیروز نگردیده است هنوز
موانع کم نبوده است
از همان آغاز!
یادمان نرود!

sian celon ankoraŭ Esperantistoj sekvas
malgraŭ la mondo indiferenta
al sia problemo lingva
kiu disigas
la animojn
soifantajn komunikon.

اسپرانتودانان هدف خود را دنبال
می‌کنند همچنان
علی رغم دنیایی که بی‌تفاوت است
نسبت به مشکل زبانی خود
که فاصله می اندازد
میان جان‌هایی
که تشنه‌ی ارتباط‌اند!

"- Ni pluiros senlacaj
en la direkton je kiu ni kredas",
"- Al ni la venko ne malproksimas!"
Ili ripetas!

"- از پای نخواهیم نشست هرگز
در راهی که بدان ایمان داریم"
"- پیروزی زما دور نیست!"
تکرار می‌کنند ایشان!

Estas nur l' espero
kiu subtenas ilin kaj vivigas
en la mondo kiun regas
mon', politik' kaj forto,
kaj ne necese
am' kaj humaneco!

این تنها امید است
که پشتیبان است ایشان را
و زنده نگاهشان داشته
در دنیایی که بر آن
پول، قدرت و سیاست حکمفرماست
و نه الزاماً
عشق و انسانیت!

D-ino Ŝirin Ahmadnia

شعر از: دکتر شیرین احمدنیا

۱ـ اسپرانتو به معنای فردی است که امید دارد روزی این زبان در میان ملت‌های جهان به عنوان زبان دوم به‌کار رود و واسطه‌ی دوستی و نزدیکی ملت‌ها گردد. اسپرو espero یعنی امید.

Murii Drinkejo

Golamreza Azarhuŝang

Estis bona vespera dimanĉo. Vetero estis agrabla kaj oni povis plezure iri eksteren kaj promenadi. Kamran irante al spegulo, pri sia ĉivespera programo, kiun de antaŭe li priplanis, pensadis: "Ŝajnas al mi ke tiu ĉi vespero, estas mia. Vetero, bonŝance, mem tion signas al mi".

Li, antaŭtagmeze, preparis ĉion. La helverdan kostumon pruntepreni de Behruz kaj rugfloran kravaton de Kamal, kaj nun tute vestita estis staranta antaŭ spegulo kaj kombadis sian hararon. Poste, iom da gelo, por ke la formo de lia hararo restu stabila kaj ne fariĝu taŭzita. Malfermante parfumbotelon, li proksimigis ĝin al sia nazo: "Oh, kia parfumo! kia aromo! Ne vane la vendisto priparolis pri ĝi." De parfum-vendisto, petegis doni al li la plej bonan parfumon. La vendisto sendube, proponis al li tiun ĉi parfumon aldonante ke la prezo sed estas iom alta. Kaj li pensis ke indas iom elspezi pro sia celo. Li parfumante sin, rigardis en la spegulo: "Nu, ĉio estas en ordo. Vere mi fariĝis eleganta kaj belaspekta, kial ne, oni elektu min. "Finfine estis tempo por ekiri.

Li kalkulis: sep stacioj per metroo, kaj ankaŭ iomete da promenado. Drinkejo, kies adreson oni donis al li estis du stratoj for de metro-stacio. Ne bezonis hasti. Li havis sufiĉan tempon. Estis je la naŭa vespere, kiam li finfine atingis tien, ĝuste kie li devis esti. Nun, por li estis bone konataj la stratoj de Tokio. Aparte ĉar Behruz donis al li precizan adreson. Kaj tiu ĉi strato estis konvena kiel Behruz klarigis al li.

Al unua drinkejo, kiun li vidis, li eniris. La drinkejo ankoraŭ ne estis plenplena. La posedanto de la kafejo rigardante lin, de malantaŭo de vendotablo klininte sian kapon, bonvenigis lin. En la drinkejo malmultaj japanoj estis videblaj. Kelkaj usonaj soldatoj estis sidantaj ĉe iu tablo kaj iliaj glasoj da viskio estis sur la tablo, antaŭ ili. Li diris al si mem: "Jes. Mi venis al ĝusta loko. Certe estas loko, kiun mi serĉas."

Apud fenestro vidalvide al la strato, li elektis iun tablon kaj iel sidis sur la seĝo, por povi rigardi eksteren kaj vidi piedirantojn. Iu juna knabino aperis ĉe lia tablo kaj kun ridanta vizaĝo salutis lin. En ŝia mano estis notlibro kaj skribilo. Ŝi demandis: " Kion vi deziras drinki?"

Kamran rigardis al ŝia staturo. Estis alta kaj maldika. Ŝiaj belaj kaj bonformaj femuroj tra ŝiaj travideblaj ŝtrumpoj estis allogaj. Ŝia jupo estis mallonga kaj tro strikta. Ŝajnis ke ĝi estis ĝuste preparita kadro por ŝiaj maldikaj kaj altaj gamboj. La kelnerino denove demandis: "Ĉu vi ankoraŭ ne decidis?" kaj fingermontris la menuon, kiu estis sur la tablo.

Kamran ridetis al ŝi kaj diris: "Sakeon, bonvolu"

La kelnerino ankaŭ ridetis ĉarme kaj diris: "Jes. Mi komprenas. Vi deziras provi japan-tipan drinkaĵon!"

Kamran kapjesis. La kelnerino skribis ion sur sia notlibro kaj foriris. Kiam ŝi iris al la vendotablo, Kamran turnis sian rigradon de malantaŭo de la kelnerino al trotuaro de strato kaj atendis. Li iomete sentis solecon. "Ah! Estis bone se mi venus kun Behruz. Tiel ni povus havi pli da dibeĉadan tempon." Li diris al si mem.

La kelnerino kunportis sakeon en porcelan-vinkarafo kun porcelan-taso. Li pripensis: "Oh, denove moderniĝintaj japantradiculoj! Pro tio ke mi mendis japanan trinkaĵon, ili volas ke ĉio estu japantipaj. Ŝi povis simple kunporti ĝin en botelo kun kristala glaso. Tamen por japanoj, formalaĵoj estas formalaĵoj kaj necesaj."

Kiam la kelnerino lasis lin solan, li komencis drinki iom post iom. Li samtempe rigardis la enon kaj eksteron de la drinkejo. Li volis atenti ĉiujn alvenantojn. La drinkejo jam komencis esti iom post iom plena. Kelkaj uson-soldatoj, brakumante du japanajn knabinojn envenis kun granda bruo kaj sidis ĉirakŭ tablo. Estis klare ke ili antaŭe estis drinkantaj sufiĉe kaj venis ĉi tien por daŭrigo de drinkado.

Estis post la deka, kiam envenis du japanaj virinoj de alia flanko de la strato. Li bone vidis ke ili venas al la drinkejo kaj tuj pensis: "Ŝajnas, ke ili estas pli malpli kvindek-jaraĝaj, sed espereble ili ne havu multe da sulkojn sur la vizaĝo."

Ĉiuj okuloj en la drinkejo turniĝis al tiuj ĉi virinoj, envenantaj al la drinkejo, eĉ okuloj de tiuj soldatoj, kiuj venis kun du knabinoj. Iu sidanta ĉe la tablo proksime de la pordo tuj ekstaris kaj por renkonti proksimiĝis al ili. Antaŭ ili, li kiel japanoj kliniĝis kaj montris al ili sian tablon, ĉe kiu kelkaj viroj estis sidantaj. Li diris ankaŭ ion, kion Kamran ne sukcesis aŭdi. Du virinoj,

ridante, sed sen-atente trapasis la viron kaj iris al vendotablo. Posedanto de drinkejo, bonvenigante ilin, montris iun tablon kaj invitis ilin sidi ĉe ĝi.

La virinoj, irante al tablo, rigardis al ĉiuj ĉeestantoj, unu post la alia, kvazaŭ volis elekti ion kaj aĉeti ĝin. Eĉ kiam finfine ili sidis apud tablo, ili ankoraŭ ne prenis sian rigardon kaj atenton al la viroj.

" Ekkomencis." Murmuris Kamran.

Li rigardis al sia neklara bildo en la vitro de la drinkeja fenestro kaj per mano ordigis sian hararon. Poste iom suprenigis sian kravat-nodon kaj turnis sin al tiuj du virinoj kaj ekridetis.

La kelnerino ŝajne portis al ili botelon da blanka vino kun du glasoj. Ili komencis drinki kaj ŝajnigis ke ne plu atentas al la ĉeestantoj. Kamran kelkfoje tiris sin supren flanke de ili kaj ridetis al ili. Eĉ unu fojon prenis sian tason kun sakeo kaj montrante ĝin al tiuj virinoj, drinkis ĝin, kiel signo de saluto. Li sukcesis ricevi rapidan kaj forkuran rigardon de unu el ili por momento, sed tiu rigardo glitis de li kaj restis al iu altstatura junulo kun blondaj haroj.

"Fino." Kamran diris tion kaj surmetis sian tason sur la tablon.

Nun estis venantaj pli da virinoj. Kaj preskaŭ ĉiuj estis pli ol kvardek- aŭ kvindekjaraĝaj. Post iom da tempo li rimarkis ke du junuloj estas sidantaj ĉe tiuj du virinoj. Unu el ili, estis same alta viro kaj alia, iu usona soldato. Ili ekstaris kvarope. Unu el la virinoj pagis anstataŭ ĉiuj, kaj prenante brakon de usona soldato, kunportis lin kun si.

Iom post iom, Kamran sentis varmon pro tio ke alkoholo fluis en lian sangon kaj per ĝi atingis al lia kapo. Li estis sola, iom ebria, kaj sub bruo kaj fumo de la drinkejo, pensis ke jam sufiĉas. Li malfortigis nodon de sia kravato kaj profunde enspiris. Lia rigardo, alifoje turniĝis sur ĉiuj klientoj de la drinkejo. Ĉie, estis virinoj sidantaj ĉe junaj viroj, kiuj estis aŭ europanoj aŭ usonanoj; sed pli multe usonanoj. Krom li, kiu estis aziano, apud tablo, ankaŭ estis sidataj du preskaŭ nigravizaĝaj junuloj, kiuj laŭ Kamrana sugesto devas esti el Baratio aŭ Pakistano.

Ĉifoje li mendis viskion. Li esits manĝanta nenion kun sia drinkaĵo. Lia stomako forte sentis malsaton. Sed, li estis zorgema pri sia mono en la poŝo. Se li ne povis ĉasi iun virinon, do tiu malgranda sumo, kiu estis en lia poŝo povus esti malaperinta. Li antaŭe pripensis, ke se li estus bonŝanca kaj plaĉus al iu virino, eble gajnos dek kvinmil enojn, aŭ eĉ pli, kaj eble ankaŭ pasigos agrablan kaj memorindan nokton.

Li pensis: "Ne gravas se ŝi estus kvindek aŭ eĉ sesdekjaraĝa. Kompreneble se mi estos bonŝanca ŝi povos esti pli juna, do des pli bona!" Sed estis ne li, kiu povis elekti. Virinoj devas elekti lin. Li denove pensis: "Se mi sukcesos amikiĝi kun riĉulino, eble pli ofte mi povas esti kun ŝi. Do, tiam mi ne bezonas plu labori tiel malfacile en konstru-kompanioj de matene ĝis vespere kaj ĉiam esti timanta ke se pluvos, mia laboro provizore ĉesas kaj mi ne povas gajni monon."

Li rimarkis, ke virino venas al li. "Mia Dio! Ĉu tio estas mia ŝanco?" li murmurante tion, tuj fortigis nodon de sia kravato kaj supren-tiris ĝin. Li preparis sin por akcepto de la virino. Ŝi estis iomete dika kaj malalta kaj estis vestita per blanka ĉemizo kun mallongaj manikoj, kaj nigra jupo. Jes, ŝi estis venanta al li. Ŝi multe uzis ruĝan koloron por kosmetiko kaj tamen li ne ŝatis tiun ruĝan koloron. La virino haltis apud lia tablo. Kamran ekstaris el sia seĝo. Li sentis kapturniĝon. La sango kuris al lia vizaĝo. Por kontroli sin, li metis siajn manplatojn sur tablon. Tiam, ĝentile kaj imponece kliniĝis antaŭ ŝi.

La virino rigardis lin kaj ekridetis. Kamran klopodis japanan lingvon laŭeble plejbone paroli:

"Vi honorigis min."

La virino sidiĝis sur la seĝon kaj diris: "Oh, kiel gracia! El kie vi venas?"

Kamran malrapide eksidis sur sian seĝon kaj diris: "El Irano."

La virino ripetis: "Irano?"

Kamran klopodis rideti. "Jes. Mi kaj vi ambaŭ estas orientantoj! Ĉu ne estas interese?"

Linioj de la virina frunto sulkiĝis kaj rondo de ŝiaj okuloj pli mallarĝiĝis. Kamran sentis ion, sed tuj demandis: "Kion vi deziras drinki, mi mendu por vi?"

La virino demetis sian ŝultra-sakon de ŝultro kaj metis ĝin sur la tablon kaj diris: "Dankon. Mi mem mendos!" kaj turnis sian rigardon en la drinkejo. La kelnerino venis ĉe ilin. Kaŝe palpebrumis al Kamran kaj aludis la virinon. Kamran ridetis.

La virino diris: "Drinkaĵon! Du glasojn!"

Kamran rigardis al sia glaso. Ĝi estis malplena. Li suprenigis sian kapon kaj diris: "Mia nomo estas Kamran. Estas plezure konatiĝi kun vi."

La virino demandis: "Ĉu vi por labori venis al japanio?"

Kamran pensis, pro kio devas kaŝi veron. "Jes. Jam estas preskaŭ unu jaro." Li diris.

La virino diris: "Irananoj estas danĝeraj homoj. Oni ĉiam diras tion en la gazetaro kaj televido."

Kamran diris: "Estas nur mispropagando. Ne aŭskultu tiujn sensencaĵojn."

La virino diris: "Ne ĝeniĝu. Ne temis pri vi."

Kamran diris: "En Japanio ankaŭ ekzistas Jakuza (japana mafio). Sed ne ĉiuj japanoj estas anoj de Jakuza, ĉu ne?"

La virino nur diris: "Jes. Kompreneble!"

Ŝi prenis sian glason kaj drinkis unu guton de ĝi; kaj denove demandis: "Kial vi venas ĉi tien por labori? Via lando estas sufiĉe riĉa. En ĉiuj domoj viaj estas petrolputo."

Kamran ekridis. Laŭte ridis. La virino konsterniĝis. Kamran ĉesigis sian ridadon. Li sentis denove, ke lia kapo turniĝas. Li per du manoj kaptis sian kapon kaj diris: "Pardonu!"

La virino haste diris: "Ne, ne. Ne bezonas pardonpeti." Kaj denove turnis sian kapon en la drinkejo. Juna nigrulo estis alvenanta al ilia flanko. Kiam li atingis al la antaŭo de ilia tablo, diris: "Hi!"

La virino respondis: "Hi!" kaj daŭrigis: "Mi pensis ke vi ne estos trovebla hodiaŭ. Ĉu vi ne devas iri al la oficiala misio?"

La nigrulo diris: "Mi ne iris." Kaj sen invito sidis ĉe la virinon. Kamran proksimigis sian glason de viskio al li, kaj kapkliniĝis, dirante: "Usonano?" La nigrulo ne atentis lian parolon, kvazaŭ li ne ekzistas tie.

La virino diris: "Jes, li estas usonano." Kaj denove turnis sin al la nigrulo kaj demandis: "Kion vi deziras drinki? Mi volas mendi por vi." La nigrulo diris: "Oh, mi drinkis terure. En alia drinkejo mi estis, sed mi estis certa ke mi povas trovi vin ĉi tie."

La virino denove demandis: "Ĉu vi estas kun viaj amikoj?"

La nigrulo respondis: "Jes. Sed ne pripensu. Lasu ilin havi sian plezuran tempon. Ankaŭ ni iros por havi bonan tempon kune. Ĉu ne?" Kaj ridante palpebrumis al ŝi.

La virino diris: "Bone."

Ili ambaŭ ekstaris. Kamran ankaŭ ekstraris. Li malfacile povis kontroli sin sur siaj gamboj. Li iris proksime kaj staris ĉe la nigrulo kaj diris: "Hej, aŭskultu ulo! Ŝi estas mia."

La nigrulo rigardis al Kamran. Li ne komprenis kion li diris. La tono de Kamran ne estis amika. Kamran kaptis brakon de la virino. Ŝi detenis sin flanken. La nigrulo puŝegis lin kaj diris: "Fuck you." Kamran ekfalis sur tablon. Sed rapide li ekstaris kaj atakis lin. Kamran subite sentis fortan doloron ĉe sia stomako kaj ekvomis. La nigrulo ne atendis kaj kaptis lian hararon, malsupren tiris la kapon de Kamran kaj per genuo forbatis en lia vizaĝo. Salitan guston de la sango kun acida gusto de stomak-enhavo, li sentis en sia buŝo. Li ekfalis sur teron. La virino kriaĉis kaj kuris al la elireja pordo. La nigrulo denove diris: "Fuck you." kaj sekvis la virinon.

Kamran malfacile tenis sian korpon kaj komencis ekstari. Sed ne sukcesis komplete stari. Do, li faligis sin sur seĝon, kaj per la mano purigis siajn buŝon kaj lipojn. Lia mano estis sangita. Suprenigis li sian kapon. Kelkaj usonaj soldatoj estis sidantaj ĉirakŭ tablo kaj rigardante lin, ekridis al li. Kamran malsuprenigis sian kapon. Liaj vestaĵoj estis malpuraj. Enhavo de lia stomako, malpurigis lian jakon, ĉemizon kaj kravaton. "Nu, kion mi povas diri al miaj amikoj, kiuj posedas tiujn vestaĵojn." Li murmuris kaj fariĝis ege kolera. Li volis ekstari el sia loko kaj postsekvi la nigrulon, tamen kapturniĝis kaj denove ekfalis sur la saĝon. La knabino, kelnerino, rapide venis al Kamran. Estis en ŝia mano mantuko.

"Mi ege bedaŭras. Fine fariĝis malbone." Ŝi diris.

Kliniĝante al li, ŝi volis purigi liajn vestaĵojn. Kamran prenis mantukon de la knabino kaj mallaŭte muĝis: "Bastardoj! Ili ĉion posedas."

Septembro 2002

Rilato inter lingvo kaj skribo

Hamze Ŝafii (Inĝ. pri telekomunikado)

Enkonduko

La hodiaŭa mondo iras rapide al grandaj ŝanĝoj. La ŝanĝoj okazas en ĉiuj terenoj de nia vivo, kaj ni ĉiuj sentas la ĉiaman ŝanĝiĝon de nia ĉirkaŭaĵo. Eble la plej gravaj ŝanĝoj okazas en la komunikiloj. Oni nomas la nunan epokon kiel la komunikad-epoko kaj informad-epoko. Lingvo estas la ĉefa rolulo en nuntempaj ŝanĝoj. Hodiaŭ preskaŭ ĉiu persono en ĉiu angulo de la mondo povas komuniki kun aliaj personoj. Ne eblas ignori lingvojn kaj la bezono por krei harmonion inter diversaj aspektoj de lingvo, kiel parolo, skribo, kaj lego.

La komenco de skribo

Skribo estas grava invento de homaro. Komence, multaj homaj socioj rigardis ĝin kiel superhoman kreaĵon. Hebreoj kredis ke Jehovo inspiris la skribon al Moseo. Islamanoj legas en Korano ke la Dio instruis al homoj la sciencon de skribo. Grekoj konsideris la inventon de skribo samgrava kiel la malkovron de fajro. Eble tiu kredo ne signifas ke ili sciis kaj komprenis la gravecon kaj la rolon de skribo en la vivo de homaro, sed eble ili nur kredis ke la skribo estas iu superaĵo kaj mistera afero. Eĉ post la malapero de tiuj kredoj, ankoraŭ la respekto kaj timo al skribo restis ĉe multaj homoj. Kredo je "skribo" estas natura fenomeno, ĉar "diro" povis registriĝi nur per skribo kaj resti por ĉiam. Diro estas fulme pasanta kaj neĉiama, sed skribo estas dokumento porĉiama.

Rilato de skribo kaj parolo

Ni povas esplori rilatojn inter skribo kaj lingvo el multaj aspektoj. Estas evidente ke tiu ĉi rilato estas tre forta. Fakte skribo estas parto de lingvo ĝenerale, sed skribata lingvo kaj parolata lingvo havas krom similecoj ankaŭ diferencojn.

La diferenco inter skribo kaj lingvo estas klara el aliaj aspektoj. Kelkaj homoj rigardas ĝin kiel ekzaktan kaj ĝustan prezenton de la lingvo. Tiu ĉi kredo estas malĝusta. Neniam ni skribas tiel same, kiel ni parolas, sed ni skribas kiel aliaj skribas. Skribo ĉiam estas

Alfabeto por senskribaj lingvoj
Indiĝenaj loĝantoj de Usono ne skribis sian lingvon antaŭ la elmigro de eŭropanoj tien. Komence de 1820aj jaroj, la gvidanto de Cherokee, elp. Ĉeroki, nomata Sequoyah, elp. Sekuoja, kreis alfabeton kaj skriban lingvon por sia denaska lingvo. Multaj Ĉerokioj tuj lernis la novan skriban lingvon, kaj en 1828 ili publikigis la unuan indiĝenan ĵurnalon en usono, skribitan kaj en la ĉeroka kaj en la angla.

prezento de komuna lingvo, kaj la komuna lingvo diferencas de la parolata lingvo. Parolata lingvo diferencas same paralele kun la varioj en la aspektoj kaj personaj karakteroj de homoj.

Certe en ĉiuj skriboj de la mondo ekzistas malperfektecoj kaj problemoj. La kialo estas tio, ke lingvo ĉiam rapide ŝanĝiĝas kaj evoluas, sed skribo ne ŝanĝiĝas samrapide. Ŝanĝo en skribo tiam estas neevitebla kiam la lingvo multe evoluas kaj disvastiĝas en aliajn landojn. Ekzemple la araba lingvo komence ne havis punktitajn literojn en sia vortaro, kaj ankaŭ ne havis manierojn por prezenti ĉefajn vokalojn (a, e, o). En la Greka lingvo en ekzistis signoj por intonacio kaj akcento. Tiuj signoj aldoniĝis al la Greka lingvo post ĝia disvastiĝo kaj populariĝo en Egiptio, por ke ne-grekoj, kiuj deziris lerni la lingvon, tion povu fari pli facile. La punktitaj literoj prezentiĝis en la araba lingvo post ĝia penetro en la persan

lingvon.

Ne eblas ĝuste paroli iun lingvon sen havi eblecon por aŭdi ĝin. Diferencoj kaj malperfektecoj inter la lingvo kaj skribo, kiu aperas tre malrapide pro la evoluo de lingvoj, estas problemo de ĉiuj nacioj. Vortoj kaj sonoj ŝanĝiĝas dum la tempo. Tiu ĉi ŝanĝiĝo okazas en parolo, sed ne samrapide en skribo. La skribo ĉiam konservas la malnovan prononcon kaj formon. De tie ĉi komenciĝas la diferenco inter skribo kaj parolo. Alia kialo estas tio, ke ĉiu lingvo prenas vortojn de aliaj lingvoj, kaj se la literoj estas la samaj en ambaŭ lingvoj, tiam la fremda vorto aperas per la samaj literoj, kiuj ofte havas diferencon kun la simila vorto en la dua lingvo, de tie estiĝas diversaj skrib-signoj por similaj paroloj. En la persa lingvo tiu ĉi fenomeno estas klare evidenta. Multaj arabaj vortoj envenis la persan kaj skribiĝas per la sama ĉefa skribo, sed pers-lingvanoj neniam prononcis tiujn vortojn same kiel arab-lingvanoj eldiras. Simila problemo estas evidenta en la franca kaj angla lingvoj.

Klasifiko de problemoj en rialto de skribo kaj parolo

Resume, ni povas klasifiki problemojn en skribo de diversaj lingvoj en kvar kategoriojn:

1-Sama skribo montras plurajn sonojn.
Ekzemplo:
Angla: “si” en vortoj “sing” kaj “mission”.
Franca: “-ille” en vortoj “ville” kaj “fille”.

2-Unu sono skribiĝas per pluraj formoj.
Ekzemplo:
Persa: Ekzistas tri simboloj por la sama “s” (س-ص-ث).
Franca: Jenaj vortoj prononciĝas same: saint, ceint, sein, seing, sain

3-Sonoj (simboloj) kiuj skribiĝas sed ne prononciĝas.
Ekzemplo:
Angla: “gh” en “high”
Franca: “ent” en “chantent” …

4-Sonoj kiuj prononciĝas sed ne havas simbolojn por ili.
Ekzemplo: En la ordinara persa kaj araba lingvoj oni ne uzas simbolojn por la vokaloj (a, e, o)

Iomete pri la problemoj en la persa lingvo

La persa lingvo apartenas al la Indo-Eŭropa familio de lingvoj, kiuj havas radikon de la Sanskrita lingvo. La plej evidenta specifikaĵo de la persa lingvo estas ĝia buŝa kaj parola formo. Nome, la persa lingvo havas grandegan diferencon inter parolo kaj skribo.

Kojnoskribo
La antikvaj popoloj de Okcidenta Azio utiligis kojnoskribon, sistemo de skribado sur la argilaj aŭ ŝtonaj tabeloj, kio probable komenciĝis en Sumero. Sciencistoj povis eklerni la legadon de la kojnoskribo, nur post kiam oni trovis tian skribaĵon en Bistuno, en okcidenta Irano. La Bistuna Skribaĵo estis en tri lingvoj : persa, babilona kaj elama (iam nomata ŝuŝa aŭ suza), kiuj ĉiuj utiligis kojnoskribon kiel skribsistemon. Tradukado de la skribaĵo ebliĝis ĉefe per simileco de la persa kaj babilona lingvoj al la modernaj lingvoj, kaj ankaŭ la fakto ke ĉiuj tri skribaĵoj enhavis la saman tekston.

Fakte unuafoje la brita asiriologo kaj diplomato kavaliro Henry Creswicke Rawlinson, elp. Henri Krezŭik Roŭlinsen (1810-1895), sukcesis deĉifri la parsan parton de la Bistuna Skribaĵo en 1846, kaj nur post tio, oni povis legi la du aliling-vajn tekstojn, kio enhavis saman materialon pri la geneologio kaj venkoj de la persa ŝaho Darjuŝo I (Darius I, 558 ?-586 ? a.K.).

Tiu ĉi diferenco ne nur estas en skribo de vortoj kaj sonoj, sed eĉ la formo de la vortoj kaj frazoj diferencas en skribo kaj parolo. Laŭ la lingvistoj, la kialo de tiu ĉi granda diferenco, kiu eble ne havas similon en la tuta mondo, estas tio ke la persa lingvo dum la historio ne havis propran skribon. Iam la persoj skribis per la sumera skribo (kojnoforma skribo) kaj poste aliaj skriboj estis uzataj, kaj laste ili uzis miksaĵon de antaŭaj skriboj kune kun la araba skribo. Tiuj ĉi kaŭzis ke oni tre facile povas trovi multajn ekzemplojn de ĉiuj kvar supre menciitaj problemoj en la persa lingvo. Kiel preskaŭ ĉiuj aliaj lingvoj, nuntempe ankaŭ en Irano estas granda diskuto pri la ŝanĝoj kaj reformoj en lingvo mem kaj ĝia skribo.

En serĉo de la plej perfekta lingvo

Ĉiu lingvo havas munimume unu el supre menciitaj problemoj. Ni ne povas trovi perfektan rilaton inter parolo kaj skribo de naciaj lingvoj. En la serĉado ĉirilate, ni povas



Hieroglifa Papirusa Skrib-rulaĵo
Antaŭ inventiĝo de papero, multaj popoloj skribis sur skrib-rulaĵoj faritaj el papirus-planto. Oni povis fari bonan surskribeblan surfacon el la planta celulozo. Tiu ĉi hieroglifa skribrulaĵo estas parto de la Libro de la Mortintoj apartenanta al la antikva Egiptujo. Ties detalaj ilustraĵoj bone elmontras restivon kaj kvaliton de papiruso.

nur trovi Esperanton kiu havas la plej perfektan rilaton inter skribo kaj parolo. En Esperanto ĉiu skribo montras nur unu sonon kaj ne ekzistas litero kun pluraj sonoj. Ankaŭ ne ekzistas sono kun pluraj skribaj formoj. Ĉiu sono havas unikan prononcon. Krome ne troviĝas skribaj sonoj kiuj ne prononciĝas. Nu restas evidente ke Esperanto ne solvas la kvaran kategorion de problemoj inter skribo kaj parolo, nome estas sonoj kiuj prononciĝas sed ne ekzistas simboloj por ili. Tiu ĉi problemo ne estas en Esperantaj vortoj, sed en vortoj kiuj envenis Esperanton el aliaj lingvoj.

Certe Esperanto sukcese solvis grandan parton de tiuj ĉi problemoj, sed eĉ Esperanto ne atingis perfektecon en la rilato de skribo kaj parolo. Tamen ŝajnas ke ĝi estas la plej perfekta lingvo ĉi-rilate. Tio signifas ke oni skribas per simboloj kiuj estas ĝuste tiel legataj kiel ili estas parolataj. Do, ĉiu skribaĵo estas legata perfekte same kiel ĝi estas parolata. Ne en ĉiuj lingvoj tio estas ebla. Se oni scias la alfabeton de Esperanto, oni povas legi kaj skribi ĝin tute ĝuste, sed en multaj lingvoj, eĉ post jaroj da studado, oni ne povas atingi tion. En multaj lingvoj diktado estas tre grava lern-temo en lernejoj kaj universitatoj. Instruisto legas tekston kaj studento devas skribi ĝin ĝuste. Tio estas malutiligo de tempo kaj kaŭzas mutle da elspezo por igi studentojn por nur skribi tiel, kiel estas norma skribo en la socio.

Do, kiel ni povas skribi perfekte kion ni parolas, kaj ĉu entute la problemoj estas solveblaj? Ni povas trovi lingvojn, kiuj estis adoptitaj kaj pasis grandajn ŝanĝojn por solvi partojn de tiuj ĉi problemoj. Ekzemple en la turka lingvo, oni ŝanĝis la tuton de la alfabeto de arab-devena al latina alfabeto. Tiu ĉi ago rezultis al pli simpliĝo kaj pliklarigo de la lingvo. Nun en la turka lingvo preskaŭ ne estas problemoj en legado kaj skribado por tiuj, kiuj scias la alfabeton. Do, ŝanĝi alfabeton al pli simpla kaj sen-escepta alfabeto povas helpi nin atingi pli perfektan rilaton inter la skribo kaj parolo. La persa alfabeto havas 36 literojn, sed preskaŭ 9 literoj estas senutilaj kaj oni povas tre simple forigi ilin de la alfabeto. Ili ofte estas arab-devenaj literoj, kiuj aldoniĝis al la persa alfabeto post la invado de araboj al Persio. Sed ĉiam estas malfacile ŝanĝi la alkutimiĝintan situacion. ★

Bibliografio:

Zabanshenasi va zabane farsi (Lingvistiko kaj la persa lingvo), d-ro Parviz Natel Hanlari, Tehrano: Tus eldonejo, 1994.

The study of language: an introduction (La studado de lingvo), George Yule, Cambridge University Press, 1985.

Zaban va tafakkor (Lingvo kaj penso), Mohammad Reza Bateni, Tehrano, 1999.

Microsoft Encarta 2004, far ĉirkaŭ 700 kontribuantoj kaj 100 konsultantoj, versio: 13.0.0.0531, Usono: Microsoft, 2004, 5 CDs.

Deponado

Tiel mi aûdis ke viro eliris de la domo frumatene por iri la banejon. Survoje, li vidis el siaj amikoj unu. Li demandis: "Ĉu vi akompanus min eniri la banejon?". La amiko respondis: "Mi venos kun vi ĝis la banejo, sed mi ne povos eniri ĝin ĉar al mi estas alia laboro. Kaj li akompanis lin ĝis la ĉirkaûaĵo de la banejo. Atinginte vojduiĝon la amiko nesciiginte lin, daûrigis vojon alidirekten.

Hazarde, malantaû la viro ŝtelisto postiris por plenumi sian ĉiutagan laboron. La viro sin turnis al la ŝtelisto kaj pro mallumeco, li imagis la ŝteliston kiel la amikon. 100 dinarojn li havis en sia maniko fermita en tukaĵo. Li elprenis ĝin el la maniko kaj donis al la ŝtelisto kaj diris: "Ho! frato! Ĝi estas deponaĵo ĉe vi. Tiam, kiam mi elvenos de la banejo redonu ĝin al mi." La ŝtelisto prenis la oron de li kaj atendis tie ĝis kiam li eliĝis de la banejo: jam estis lume. Li sinvestis kej elvenis rekten. La ŝtelisto vokis lin kaj diris: "Ho! Bonviro! Reprenu vian oron kaj iru, ĉar hodiaŭ mi ne povis fari mian laboron pro tenado de via deponaĵo. La viro diris: "Kio estas tiuj ĉi oraĵoj kaj kiu estas vi?" Li respondis: "Mi estas ŝtelisto, vi mem donis la oron al mi."

Li diris: "Se vi estas ŝtelisto, kial vi ne ŝtelis mian oron?"

La ŝtelisto diris: "Se laû mia profesio mi forprenus de vi la oron - eĉ se ĝi estus 1000 dinaroj - neniel mi timus pro la forprenado kaj neniel redonus ĝin, tamen, kiel deponaĵon vi donis ilin al mi, deponanto ne indas perfidi, ĉar forprenado de deponaĵo ne estas justa.

El: **Gabusname** (Gabus-libro) far *Onsor-ol-maani Kejkavus Ebne-Eskandar Ebne-Gabus* (11a jc p.K)

Tradukis: (F-ino) *Mansure Fazel-zade*

امانت داری

چنان شنودم که مردی سحرگاه از خانه بیرون رفت تا به گرمابه رود. به راه اندر دوستی از آن خویش را دید. گفت، موافقت کنی تا به گرمابه شویم؟ گفت، تا در گرمابه با تو همراهی کنم لکن اندر گرمابه نتوانم آمدن که شغلی دارم، و تا نزدیک گرمابه بیامد. به سر دو راهی رسید. بی‌آن‌که این مرد را خبر داد بازگشت و به راه دیگر برفت.

اتفاق را طراری از پس این مرد می‌رفت به طراری خویش. این مرد باز نگرید. طرار را دید و هنوز تاریک بود، پنداشت که آن دوست وی است. صد دینار در آستین داشت بردستارچه بسته. از آستین بیرون گرفت و بدین طرار داد وگفت، ای برادر! این امانت است به تو. چون من از گرمابه بیرون آیم به من باز دهی، طرار زر از وی بستد و آن‌جا مقام کرد تا وی از گرمابه بیرون آمد روز روشن شده بود. جامه بپوشد و راست همی رفت. طرار وی را بخواند و گفت، ای جوانمرد! زر خویش بازستان و پس برو که امروز از شغل خویش فروماندم از این نگاه‌داشتن امانت تو، مرد گفت، این زر چیست و تو چه مردی؟ گفت: من مردی طرارم. تو این زر به من دادی، گفت، اگر تو طراری چرا زر من نبردی؟

طرار گفت: اگر به صناعت خویش بردمی، اگر هزار دینار بودی، از تو یک جو نه اندیشیدی و نه باز دادمی ولکن تو به زنهار به من دادی. زینهاردار نباید که زینهارخوار باشد که امانت بردن جوانمردی نیست.

از قابوسنامه، نوشته: عنصرالمعالی کیکاووس بن اسکندربن قابوس، قرن پنجم.

ترجمه: منصوره فاضل‌زاده – تهران

Floroj el "La Florejo" de Sadio

Estas printempo kaj denove kresksas floretoj ĉie en la naturo. En tiu ĉi rubriko ankaŭ estas elektitaj floretoj el la libro "La Florejo" de la granda irana verkisto, Sadio. Temas pri la lasta ĉapitro de la libro kiu enhavas maksimojn por ĉiutaga vivo. Ĝuu ilin kaj havu bonan novjaron iranan.

Inter du malamikoj tiel parolu ke vi ne hontu se ili fariĝos amikoj.

سخن میان دو دشمن چنان گوی که گر دوست گردند شرم زده نشوی.

Dek homoj pace manĝas ĉirkaŭ-table sed du hundoj ĉirkaŭ-kadavre bojas malafable. Postulemulo ne satiĝas eĉ per oceano sed kontentiĝemulo satiĝas eĉ per pano. Saĝuloj diras: "Riĉo per kontento pli bonas ol riĉo per arĝento."

Eĉ havunte la mondon postulemul' sentas malsatecon,
sed kontentiĝema intest' pleniĝas manĝante pan-pecon.

ده آدمی بر سفره ای بخورند و دو سگ بر مرداری با هم بسر نبرند. حریص با جهانی گرسنه است و قانع به نانی سیر. حکما گفته‌اند توانگری به *قناعت به از توانگری به بضاعت.*

روده تنگ به یک نان تهی پرگردد
نعمت روی زمین پر نکند دیده تنگ

Esti feliĉulo malriĉa pli bonas ol esti reĝo malfeliĉa.
Se vi gajiĝu post malgajo,
Pli bonas ol malgaj' post gajo.

گدای نیک انجام به از پادشاه بد فرجام.
غمی کز پیش شادمانی بری
به از شادیی کز پسش غم خوری

Tiu admonas reĝojn kiu nek timas teroron nek ŝatas oron.

Ĉu verŝi sur diista pied' oron,
ĉu meti hindglavon sur lian koron,
lin ja ne timigas iu krom Dio,
tial ke diism' baziĝis sur tio.

نصیحت پادشاهان کردن کسی را مسلم بود که بیم سر ندارد یا امید سر.
موحد چه در پای ریزی زرش
چه شمشیر هندی نهی برسرش
امید و هراس نباشد زکس
بر این است بنیاد توحید و بس

Maldecas momento-rapide amikon ĉagreni kiun oni povas viv-daŭre preni.
دوستی را که به عمری فرا چنگ آورند نشاید که به یک دم بیازارند.

Akcepti konsilon de malamiko estas erare sed aŭskulti ĝin estas prepare por agi male kaj tio ja estas ĝusta.
Kion malamiko diras, evitu
por ke poste pro tio vi ne pentu,
Ne iru se li montras vojon rektan,
sed vi iru vojon alidirektan
نصیحت از دشمن پذیرفتن خطاست ولیکن شنیدن رواست تا به خلاف آن کارکنی که آن عین صوابست.
حذر کن زانچه دشمن گوید آن کن
که بر زانو زنی دست تغابن
گرت راهی نماید راست چون تیر
از و برگرد و راه دست چپ گیر

Al ĉiu, sia saĝo ŝajnas perfekta kaj sia filo belaspekta.

همه کس را عقل خود به کمال نماید و فرزند خود به جمال.

Eminentulon oni demandis:"Malgraŭ la meritaro ekstra havata de la mano dekstra, kial oni metas ringon sur la mano maldekstra?"
Li respondis:"Ĉar meritantoj ĉiam estas senigitaj."
Kiu kreis feliĉon kaj vivtenon
tiu donas aŭ meriton aŭ ŝancon
بزرگی را پرسیدند با چندین فضیلت که دست راست را هست خاتم در انگشت چپ چرا کنند؟ گفت ندانی که اهل فضیلت همیشه محروم باشند.
آنکه حظ آفرید و روزی داد
یا فضیلت همی دهد یا بخت

Ĉiu sidanta kun maliculoj eĉ ne alprenante ilian karakteron, kondamniĝas al imiti ilian agmanieron kaj se por preĝi li iras ruinon, oni diras ke li celas drinki vinon.
هرکه با بدان نشیند اگر نیز طبیعت ایشان در و اثر نکند به طریقت ایشان متهم گردد و گر به خراباتی رود به نماز کردن منسوب شود به خمر خوردن.

Pres-eraroj en la titoloj de la antaŭa numero

Pro ankoraŭ-ne-sciata(j) kialo(j) ekestis pres-eraroj en la titoloj de kelkaj artikoloj de la antaŭa numero de nia revuo. Tamen, ili iam estis ankoraŭ diriva, kiel «Ĉiam **Iva**» anstataŭ «Ĉiam **Aktiva**»; ili iam estis ridiga, kiel «Noŭruzo, la **rana** novjartago» anstataŭ «Noŭruzo, la **irana** novjartago», iam pensiga, kiel «La **istika** ebrieco» anstataŭ «La **mistika** ebrieco », kaj fine, ili iam estis eĉ pli poezia, kiel: «Nenio **rava**» anstataŭ «Nenio **grava**»!
Ĉiu(o)kaze, ni pardonpetas de vi pro tio, kaj esperas ke la nunan numeron vi trovos sen tiaj signifohavaj preseraroj!

La Red.

Konatiĝu kun la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro unika institucio en la monda Esperanto-movado en 2750-jara Samarkando

Anatoli I. IONESOV
(Samarkando, Uzbekistano)

Historio de fondiĝo

Ĉio fakte komenciĝis de la Lingvo Internacia Esperanto kaj de la kreita en 1977 en Samarkando Klubo de Internacia Amikeco "Esperanto", poste fariĝinta unu el la plej aktivaj en la lando. Ni komencis internacian korespondadon Esperante, ni ekhavis amikojn en multaj landoj, el alsenditaj de esperantistoj materialoj ni ekis organizi diverstemajn ekspoziciojn, inkluzive la ciklon de la internaciaj ekspozicioj "Paco - Espero de la Planedo", kiuj sukcese eksponiĝis en Samarkando, Taŝkento kaj ankaŭ en kelkaj urboj de Rusio. Alsenditaj eksponaĵoj - afiŝoj, desegnaĵoj, bildkartoj, dokumentoj ktp - intertempe formis kolekton de Samarkanda Esperanto-Klubo kaj bazon de la estonta Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, kiu estis inaŭgurita de samarkandaj esperantistoj la 31-an de decembro 1986 honore al la Internacia Jaro de Paco. La muzeo situas en la administra konstruaĵo de la Centra Parko de Kulturo kaj Ripozo de Samarkando (Mustaqillik Strato, 56).

En 1989 per la decido de estraro de Ministerio pri kulturaj aferoj de Uzbekistano la muzeo estis distingita per la honora titolo "Popola Muzeo". Ties moto iĝis la vortoj de la elstara uzbeka poeto kaj humanisto Ališer Navoi, kiu jam antaŭ kvin jarcentoj alvokis:

Komprenu, homoj de la tero, Malamikeco - ja malbeno.Vivu do ĉiam amikece, Senkverele kaj fratece.

Misio de la muzeo

La Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro estas senprofitcela neregistara organizo, korformita al universalaj homaj valoroj kaj celanta:

1-firmigon de paco, interkompreniĝo kaj interpopola amikeco pere de civila diplomatio, arto kaj arta kreado;

2-pliprofundigon de konsciiĝo kaj kompreno de la globaj defioj, evoluigo de la sento de la persona respondeco pri la solvado de tutmondaj problemoj, de kiuj dependas la estonto de de la mondo kaj pluvivado de niaj posteuloj.

3-demonstron de la multkultura varieco de la homaro, de novaj vizioj de la pli bona mondo kaj de neceso de globa solidaro.

Estante frukto de la civila diplomatio kaj siaspeca internacia inform-komunika packrea centro, la muzeo realigas diversajn edukajn programojn, internaciajn projektojn kaj artajn ekspoziciojn samkiel ĝi posedas konstantan ekspozicion.

Kolekto

La muzea fondaĵo formiĝis ĉefe el koresponde ricevitaj materialoj, reflektantaj praktike ĉiujn problemojn de la homaro, ricevintajn la nomon "globskalaj", antaŭ ĉio problemoj de pluvivado, malarmado, homrajtoj, evoluado, mediprotektado, sana vivmaniero ktp. La muzea kolekto ampleksas pli ol 20.000 eksponaĵojn el pli ol 100 landoj de ĉiuj kontinentoj - afiŝoj, flugfolioj, desegnaĵoj, pentraĵoj, tapiŝoj, flagoj, fotoj, dokumentoj, libroj, periodaĵoj, insignoj, medaloj, poŝmarkoj, slajdoj, KD-oj, muzikkasedoj, gasbalonoj, gluetikedoj, T-ĉemizoj, sunenergia forno kaj multaj aliaj. Ekzemple, japanaj amikoj donacis pecetojn de tegmenta tegolo el Nagasaki (fandiĝintaj post la atoma eksplodo kaj trovitaj je unukilometra distanco de la eksploda centro). Ĉi tie ni povas vidi kapsulojn kun la tero el la loko de Stalingrada batalo, el la fifama Koncentrejo *Auschwitz*, el la Paca Parko en Hiroŝimo... La fragmentoj de la detruita Berlina Muro - falinta simbolo de konfrontiĝo inter Oriento kaj Okcidento - oni alportis el Germanio. La Defend-ministerio de Usono - Pentagono - transdonis donace al la muzeo du partojn de la usonaj mezdistancaj nukleaj raketoj "*Pershing - 2*" malmuntitaj konforme al la kontrakto inter USSR kaj Usono, la "restaĵoj" de sovetiaj nukleaj raketoj SS-20 venis de unu el partoprenintoj de ties likvidado. Samloke oni trovas la donacon de la germana astronaŭto *Reinhard Furrer*: suveniro farinta kun li en la kosmoŝipo "*Challenger* 112 cirkaŭflugojn de la Tero. Kortuŝas per sia belo kaj vivamo la originalaj pentraĵoj de franca pentristino Denise Legrix, speciale kiam oni ekscias, ke ili estas pentritaj per la broso tenata en la buŝo de la virino naskiĝinta sen kruroj kaj

brakoj. Same impresas la pentraĵo "Trankvila akvo" far usona buŝpentristino Cindi Bernhardt.

En la ekspozicio estas multaj mirindaj per sia fantazio, heleco de farboj kaj talento infandesegnaĵoj kun iliaj infane senperaj kaj sinceraj meditoj pri si kaj pri sia percepto de la mondo, pri la mondo nuntempa kaj estonta. Peceton de ruĝa briko, uzita meze de la 19-a jarcento por konstruado de la ĉefa sidejo de Smithsona Institucio en Waŝington-urbo (nune plej granda muzeo en la mondo!), donacis usonaj kolegoj. El ĉia urbo *Xi'an* (kiu siatempe rolis kiel starta punkto de la Granda Silka Vojo!) venis bela 7-metra tapiŝo "Ni volas pacon. Ni amas pacon", farita de tieaj mezlernejanoj uzintaj 2000 eltranĉitajn el ŝtofo blankajn packolombojn. Infanoj el malproksima Nov-Zelando sendis al la muzeo ilian kolektivan verkon - 23-metran surŝtofan artaĵon pri paco. Inter multenombraj eksponaĵoj estas unikaj dokumentoj, raraj libroj, afiŝoj...

La tuta ekspozicio substrekas la prioritaton, kiun homoj en la tuta mondo atribuas al universalaj homaj valoroj kaj vivnecesa tasko, ke tiu prioritato estu rekonita en internaciaj rilatoj. Verdire, ni mem estis surprizitaj kiel rapide kaj vaste la ideo pri fondo de tiu ĉi muzeo estis akceptita kaj subtenita en la tuta mondo. Mi pensas, ke tio montras, ke ĉiuj homoj, sendepende de iliaj loĝlokoj, antaŭ ĉio zorgas pri la problemoj de paco, homrajtoj kaj konservado de la vivo sur nia planedo.

La muzeo havas vastajn kontaktojn kun multaj internaciaj kaj naciaj (interregistaraj kaj neregistaraj) organizoj kaj kun miloj da homoj de bona volo sur ĉiuj kontinentoj. Siajn publikaĵojn al la muzeo sendas UNO, OSKE, Europa Konsilio, UNESKO, ICOM, NATO, Internacia PEN-klubo, Norvega Nobel-Instituto, Monda Konsilio de Eklezioj, Monda Banko, Internacia Komitato de Ruĝa Kruco kma. La muzeo estas membro de la Internacia Paca Buroo en Ĝenevo kaj de la Internacia Reto de Pacmuzeoj. Materialoj el la muzea kolekto estis eksponataj en Cipro, Francio, Nederlando, Rusio, Usono, Japanio, Belgio kaj aliaj landoj. Estas interese, ke la unua numero (N 1/2000) de la revuo "ICOM News" eldonata en Parizo sub aŭspicio de UNESKO de la Internacia Konsilio de Muzeoj en la angla, franca kaj hispana lingvoj kaj disvastigata en 148 landoj malfermiĝis per la artikolo pri la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro en Samarkando. Ĉiu vizitanto de la muzea ekspozicio sentas sincerecon kaj universalecon de ties organizantoj samkiel de tiuj kiuj helpas al la muzeo kaj sendas ĉi tien eksponaĵojn. Oni tuj sentas, ke paco kaj sana medio - estas tio, kion homoj plej multe volas kaj ke ili pretas kune labori por humanigo de la internaciaj interrilatoj kaj por konservado de nia unusola komuna Hejmo - planedo Tero.

Dum tiuj ĉi jaroj la muzeaj aktivuloj formis kelkajn agadterenojn, en kiuj ni laboras. Ni nomu ilin konstantaj projektoj.

Ĉefaj internaciaj projektoj de la muzeo

1. "Aŭtografo de Paco"

Aktivuloj de la muzeo kreas unikan kolekton de subskribitaj fotoj, personaj mesaĝoj, vizioj kaj aŭtografiitaj verkoj de mondaj eminentuloj, signife kontribuintaj al konstruado de la pli bona mondo sur nia planedo. Jam estas ricevitaj pli ol 1000 reeĥoj kaj eksponaĵoj de nuntempaj elstaruloj, inkluzive ŝtat- kaj registar-estrojn, gvidantoj de internaciaj organizoj, grandaj verkistoj, poetoj, sciencistoj, muzikistoj, astronaŭtoj, 'steloj' de teatro, kino, sporto, Nobelpremiitoj ...

Laŭpete de Fondaĵo Magenta el Amsterdamo, parto de tiu ĉi unika kolekto en majo-junio 1996 estis eksponata sur la speciala eduka ŝipo kaj vizitis 25 nederlandajn urbojn. Laŭ vortoj de reprezentantoj de Magenta, la kolekto faris "fantastan impreson".

Estonte estas planata malfermo de speciala galerio/ biblioteko/ muzeo "Autografo de Paco", kie ni eksponos aŭtografiitajn librojn, muzikajn registraĵojn, artaĵojn, arkivajn dokumentojn ktp, alsenditajn de renomaj agantoj de monda politiko, scienco, kulturo, arto...

2. "Infanoj de X-Lando: Rigardas la Mondon"

La celo de tiu ĉi projekto - ebligi al niaj samlandanoj konatiĝi kun diversaj landoj, popoloj, kulturoj tra la okuloj de infanoj de tiuj ĉi ŝtatoj. Dum lastaj jaroj la muzeo aranĝis infanartajn ekspoziciojn el Francio, Suda Koreio, Australio, Egipto, Tajvano,

Nov-

Zelando, Filipinoj, Irano, Albanio, Tibeto, Japanio, Sud-Afriko, Rusio, Malto ... En proksima futuro ni planas fondi ĉi tie la konstantan Internacian Infanartan Galerion.

3. Infana Festivalo de Paco kaj Malarmado

En la centra urba parko kaj la regiona Infana Palaco de Artoj ĝis nun ni okazigis ses similajn festivalojn. Kutime ni organizas ilin dum la Semajno de UN por malarmado. Moto de la festivalo: "Milito ne estas ludo. Kial do ludi militajn ludilojn? Paco komenciĝas de mi." Tiamaniere ni invitas infanojn interŝanĝi iliajn militajn ludilojn je pacaj. Infanoj redonas siajn aŭtomatpafilojn, pistolojn, pafilojn, tankojn, katapultilojn ktp, subskribas la Internacian kontrakton pri infana malarmado kaj interŝanĝe ricevas je sia elekto diversspecajn senperfortajn kaj edukajn ludilojn, ekzemple, molajn animalojn, konstrukciilojn, kreivajn ludojn, librojn, farbojn, krajonojn, pilkojn k.a. Tiuj infanoj, kiuj ne posedas militajn ludilojn, alportas siajn poemojn, manartaĵojn kaj desegnaĵoj pri paco. Ĉiu partoprenanto estas distingata per la speciala Diplomo de paco kaj malarmado. Krom interŝanĝo de ludiloj, kadre de tiu ĉi populara festivalo okazas origami-metiejoj, koncertaj programoj, konkursoj, ekspozicioj, filmoj, loterio de paco, plumamika servo k.c. Sukcesa okazigo de tiuj ĉi festivaloj montras, ke tiujn packreajn aranĝojn necesas daŭre organizi. Ja stereotipoj de "senmalutileco" de militaj ludiloj daŭre nestas en infanoj kaj en plenkreskuloj kaj superi ilin estas sufiĉe malfacile. Ni opinias, ke militaj ludiloj ankaŭ povas kontribui al militigo de konscio de infanoj kaj gejunuloj, tial ni strebas konigi tion kaj al infanoj, kaj al iliaj gepatroj kaj proponi al ili alian alternativon. La ĉefa celo de la festivaloj de paco kaj malarmado estas inokuli al infanoj ekde frua infaneco konstruktivan kaj kreivan vidhorizonton de la vivo kaj naturo por ke ili vivu en paco kun si mem, kun pozitivaj rilatoj kaj valoroj, kiun ili povu kunpreni al ilia plenkreskula vivo kaj por ke ili neniam volu detrui tiun ĉi mondon.

4. "Belo Savos la Mondon"

Ni organizas en Uzbekistano ekspoziciojn de eksterlandaj pentristoj kaj de samarkandaj artistoj eksterlande. En tiuj ĉi ekspozicioj estas demonstrataj pentraĵoj kaj aliaj artaĵoj, malkovrantajn belon de la naturo, belon de amikeco, belon de amo, belon de kreado, belon de paco inter nacioj. Parto de tiuj ĉi artaĵoj estas en la konstanta muzea ekspozicio, ni okazigis personajn ekspoziciojn de artistoj el Francio, Anglio kaj Germanio. Sed verŝajne la plej hela elmontro de la projekto fariĝis okazigo (en Samarkando) de la internacia konferenco de artistoj "Belo Savos la Mondon" kaj de la internacia ekspozicio "Arto kaj Belo" (kunlabore kun la Asocio Artistoj por Paco), dediĉitaj al la 10-jariĝo de nia muzeo. Longtempa celo estas fondo de la Internacia Arta Galerio "Belo Savos la Mondon" en Samarkando.

5. "La Mondo Tra la Okuloj de Handikapitaj Infanoj"

Tiu ĉi projekto celas organizon de la internaciaj artaj ekspozicioj de la infanoj kun limigitaj fizikaj aŭ mensaj malordoj, viktimoj de malsanoj, perforto, krimoj, militoj, poluciita medio kaj aliaj kataklismoj. Ni volas ne nur demonstri en Samarkando kaj en aliaj urboj de Uzbekistano iliajn kreajn kapablojn, fantazion kaj inspiron, sed ankaŭ grandan spiriton de tiuj ĉi knaboj kaj knabinoj, iliajn sentojn, revojn, strebojn, vizion de la pli bona mondo tra ilia kreado.

6. "La Mondo de Ridetoj"

Ni preparas la tutmondan kolekton de ridetoj kaj invitas vin ekrideti kun ni, vin, viajn parencojn, amikojn, kolegojn, najbarojn, hejmbestojn kaj ĉiujn vivantajn estaĵojn sur la Tero. Tio povas esti ĉiuspecaj ajnformaj ridetoj, je via propra elekto (fotoj, pentraĵoj, desegnaĵoj, gravuroj, karikaturoj, komputilaj grafikaĵoj, poemoj, anekdotoj ktp). La aĝo de ridetontaj partoprenantoj kaj kvanto / dimensio de sendataj materialoj estas NELIMIGITAJ. Dum proksima tempo en la muzeo estos malfermita speciala Internacia Halo de Ridetoj. Do, komencu rideti plejeble baldaŭ, hodiaŭ, ĝuste nun...

7. Klubo de Internacia Amikeco "Esperanto"

Tiu ĉi klubo funkcias ĉe la muzeo por popularigo kaj utiligo de la internacia lingvo Esperanto kiel efektiva neutra rimedo de la internacia komunikado kaj kiel grava instrumento de pacedukado. Aktivuloj de la muzeo preparis kaj eldonis la unuan uzbeklingvan E-studlibron. La klubo "Esperanto" ankaŭ inkluzivas plumamikan servon asistantan al infanoj kaj plenkreskuloj de diversaj landoj establi senperajn reciprokajn kontaktojn, kiuj pli bone ol io kontribuas al interkompreniĝo, amikeco kaj paco sur nia planedo. Tiucele estas planate eldoni internacian gazeton de la plumamikoj.

8. "Granda Silka Vojo"

La muzeo strebas per siaj rimedoj de la popola diplomatio revivigi la tradiciojn de la Granda Silka Vojo, evoluigi kulturajn interŝanĝojn, internacian turismon, establi partnerecajn ligojn kaj kunlaboron inter lokaj kaj eksterlandaj entreprenistoj kaj specialistoj en diversaj sferoj.

9. "Samarkando en Ĉiuj Kontinentoj"

Nia hejmurbo estas parto de la Monda Heredaĵo de UNESKO. Ni kolektas ĈIUSPECAJN materialojn (leterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp) pri Uzbekistano kaj Samarkando. Fakte, CHIONAJN pri la temo, inkluzive fotojn de startoj, vendejoj, restoracioj, hoteloj, komunumoj, kompanioj, varoj ktp estos tre bonvena. Ĉiuj senditaĵoj estos eksponataj en la speciala ekspozicio en la muzeo. Ni ankaŭ publikigos la plej interesajn materialojn en nialanda gazetaro.

Perspektivoj de evoluo de la muzeo

Dum pasintaj jaroj la muzeo pruvis sian vivkapablon kiel neordinara muzeo de la nova tipo, ne havanta analogiojn en la landoj de KSS kaj Baltio. Tamen necesas agnoski, ke pro la manko de respektiva materia-teknika bazo, ties grandagaj potencialaj ebloj estas ankoraŭ ne plene utiligataj. Ni iom ekrevu. La futuron de la muzeo ni volus vidi kiel multfunkcian, ekipitan per ĉio necesa, Internacia Paccentro, laŭeble konstruita laŭ speciala projekto - kun kelkaj haloj por konstanta ekspozicio, aparta lokalo por provizoraj ekspozicioj, galerioj "Autografo de Paco", "Belo Savos la Mondon", "La Mondo Tra la Okuloj de Infanoj", Internacia Halo de Ridetoj kaj ĉambro de pacaj kreivaj ludiloj, negranda konferencejo por okazigo de renkontiĝoj, prelegoj, seminarioj kaj kreaj metiejoj, por demonstro de slajdoj, kino- kaj video-filmoj; biblioteko, arkivo, ĉambro por malstreĉiĝo kaj interna paciĝo, malgranda komputila centro kun modernaj komunikiloj kun la tuta mondo kaj eĉ mini-hotelo por volontulaj helpantoj alvenontaj ĉi-tien el diversaj landoj. Sur la planko estas muntita grandega mondmapo, ĉirkaŭe troveblas floroj kaj dekoraciaj plantoj el multaj anguletoj de la terglobo, mallaŭte sonas agrabla muziko, voĉoj de naturo, kvazaŭ kun ni parolas la planedo Tero mem...

Sed evidente ĉio-ĉi estas el la sfero de revoj. Kvankam, kiel oni diras, ke ĉio komenciĝas ekde la revo. Kaj kiu scias, povas esti iam tio efektiviĝos...

La tuta aktivado de la muzeo plejparte baziĝas sur la volontula laboro de ties aktivuloj kaj helpo de amikoj tra la tuta mondo, kiujn ni konsideras plenrajtaj "akciuloj" de la muzeo. Se vi kaj viaj amikoj dividas kun ni niajn strebojn kaj volas subteni la muzeon, via helpo estos dankeme akceptita. Nuntempe estas organizata la Societo de amikoj de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro kiel grupo de subteno de niaj iniciatoj. Kaj kompreneble, ni ĉiam tre ĝojos akcepti vin kaj viajn amikojn en antikva kaj eterne juna Samarkando kaj en nia Pacmuzeo. Bonvenon!

Niaj koordinatoj

Poŝta adreso:
Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro
P.O. Box 76, UZ-703000 Samarkand
Respubliko Uzbekistano.
Kontakta telefono/ fakso: +998 (662) 33 17 53.
Retpoŝto: imps@rol.uz (kutime por mesaĝoj en simpla TEKSTA (.txt) formato, SEN suplementoj).

Interreto:

http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html
http://www.civilsoc.org/nisorgs/uzbek/peacemsm.htm
http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/samarkand.html
http://peace.museum.com
http://satamikarohm.free.fr/esperanto/iniciatoj/samarkando.html

Rio-de-Ĵanejro

Tiu bela, moderna kaj vigla ĉefurbo de ŝtato Rio-de-Ĵanejro kun 5,880,544 loĝantoj situas ĉe la golfeto Guanabara inter la montaro kaj la atlantika oceano. Tre grava kultura, komerca, turisma kaj industria centro prezentas belajn placojn, parkojn kaj avenuojn.

La plej interesaj vidindaĵoj estas: Korkovado kun la bela statuo de Kristo, superreganta la urbon, kaj Pão de Açucar kun rava panoramo de Rio-de-Ĵanejro.

Kopakabano, Ipanemo, Leblono kaj Barra de Tiĵuko estas la fame konataj kaj vere allogaj plaĝoj de la urbo.

Aliaj nepraj vidindaĵoj estas la centro, la kvartalo Glorio, Flamengo, Botafogo, Tiĵuko kaj en la golfeto Guanabara, la romantika insulo Paketo (Paketá).

En la urbo troviĝas bonaj teatroj, kinejoj kaj kunvenejoj por ĉiuj kiuj ŝatas vesperdistraĵojn. Tie funkcias tri modernaj universitatoj. Ponto Prezidanto Costa e Silva, longa je 14500 metrojn ligas Rio-de-Ĵanejro al Niterojo kaj estas majesta verko de brazila inĝenierarto.

Tre bela, kolorema kaj popola festo estas la karnavalo en Rio-de-Ĵanejro. La Esperanto-movado pli kaj pli vigliĝas en AERĴ, Kooperativo de Esperantistoj, Societo Vladimir Lorens. La brazilanoj kiuj loĝas kaj naskiĝis en Rio estas kariokaj. Koncize kion ni volas aludi pri Rio-de-Ĵanejro estas “la mirinda urbo”.

D-ro Helio F Aderne, Brazilo

Tuso

La memoraĵo de mitoj "Ferdoŭsio kaj Ŝahnameo"

"Tus" estas urbo en la provinco Ĥorasano kaj situas 30 km-jn nordokcidente de Maŝhado.

La situo estas 36°28´ norde kaj 59°31´ orient-longe de Grenviĉa meridiano.

La remparo de malnova Tuso malgraŭ eroziego ankoraŭ bone montras ĉirkaŭaĵon de la urbo. Laŭ du vojoj eblas alveni Tuson de Maŝhado, la malnova vojo Maŝhado-Guĉano kaj la nova vojo ĉe kiu ekzistas multaj historiaj monumentoj kaj konstruaĵoj. El Tuso oni povas atingi al vilaĝoj kiuj havas kulturajn rilatojn kaj komunikajn mitojn kun maŭzoleo de Ferdoŭsio kaj lia fama libro "Ŝahname". Oriente de Tus-remparo estas vojo direktita al "Paĵ" naskiĝvilaĝo de Ferdoŭsio. Historia turo "Afangan" troveblas dum ĉi tiu vojo, alirante oni atingos la monumenton de "Ĥaĝe Rabi" kaj fine al Maŝhado.

Okcidente de la remparo ĉe alia vojeto oni povos viziti la fonton "Gilas (ĉerizo)". Tiu fonto estas la loko kaj bordo kie okazis iuj malnovaj iranaj fabeloj kaj dum pasinto Tuso ricevis akvon de ĝi.

La menciita urbo famkonate lokas en historio kaj mito de Irano kaj laŭ iuj skribaĵoj, Ĝamŝid Piŝdadi (reĝo el Piŝdadidoj, legu la numeron: 10 p: 5, 9) ordonis ĝin konstrui. Kiam la urbo ruiniĝis "Tus Nozar" refaris kaj nomis la novan urbon laŭ sia persona nomo.

En Ŝahnameo oni legas ke (reĝo) Kejĥosro donacis ĉi tiun urbon al Tus la filo de *Nozar* kaj *Kejkavuso* (alia reĝo) kaŝis trezoron nome "Arus (bofilino) en ĝin. Kiam li estis forpasinta, rekomendis tiun trezoron doni al "*Zal*, *Giv*, kaj *Rostam* (la herooj de la libro)".

Dum Sasanida imperio Tuso estis el la plej gravaj regionoj kaj eĉ havis ian specialan limgardiston nome"Konarang". Ankoraŭ ne estas difinite kial Tuso detruiĝis de post fino de la tria jarcento de Islamo en Irano, ĉar Ŝahid Balĥi (poeto) en siaj poemoj memorigas pri ĝia ruiniĝo dum la fino de la 3a kaj la komenco de 4a lunhiĝria jarcento.

Ĝis la fino de 4a jarcento la granda parto de Irano estis nomata "Tus" havante 4 urbojn, "Taberan, Radekan, Nogan kaj Torgabez". Ĉi vasta parto situis inter du montaroj **Hezar masĝed** (mil moskeoj) kaj **Binalud** en la nordo kaj la sudo de Irano. Sed nun la nova Tuso kie kuŝas maŭzoleo de Ferdoŭsio estas tiu malnova Taberano. Radekano ankoraŭ estas granda vilaĝo en kiu la historia Radekan-Turo okulfrapas. Kaj Torgabezo hodiaŭ estas Torgabe plus Nogano ankaŭ vizitindas en Maŝhado.

Tuso en la mezo de la 6-a jarcento pro atako de Gazanavidoj detruiĝis kaj en la komenco de la 7a Ĝalal-ed-din Miranŝah, kruela filo de Tejmuro tiel ruinigis Tuson

ke ne plu restis eĉ unu vilaĝeto. Ŝahroĥ Tejmuri kaj liaj anstataŭuloj klopodis rekonstrui ĝin sed preskaŭ vane, la tre grava problemo estis pro akvo. Renversigi la akvon de Gilas aŭ Golasb-fonto el Tuso al Maŝhado en la 9a jarcento okazis per "Aliŝir Navai" kaj atakoj de Ŝibak-Ĥano el uzbekoj dum jaroj 913- 915 lunhiĝriaj, malgraŭ tio ke li poste volis rekompensi sed ne trovis tempon kaj mortis. Forlasita Tuso sen iu registro, sen akvo pli kaj pli detruiĝis.

Sed maŭzoleo de Ferdoŭsio rolis kiel fortiga povo. Ferdoŭsio irana epopea poeto kiu dum 30 jaroj gardis persan lingvon kaj ne permesis forgesiĝi la nomo de Tuso. La vizitantoj kaj liaj dankemuloj ĉiam venis kaj venos al li. Do estas dirinde Tuso en nuna periodo estas grava nur pro kar-memoro de sia famekonata
literatura trezoro Ferdoŭsio. La maŭzoleo en remparo de malnova Tuso situas en vasta ĝardeno kies parto apartenis al la poeto mem. Kial oni Ferdoŭsion entombigis en lia viv-loko, estas historia aventuro pri kio rakontas Nezami Aruzi en jaro 510 kiam venas al Tuso.

La maŭzoleo en la jaro 1313 sunhiĝria (1934) per Asocio de Naciaj monumentoj estas konstruita kiam samtempis kun jarmila naskiĝdato de la granda poeto. Ĝi inaŭguriĝis al pli ol cent sciencistoj, orientalistoj kaj poetoj de Irano kaj aliaj landoj.

La arkitekturo estas kiel Persepolo. Molaj malsupraj tavoloj de la tero kaŭzis iom subfleksiĝon de la konstruaĵo kaj aliflanke la interna parto de maŭzoleo por vizitantoj ne estis sufiĉa, do ĝi fermiĝis en 1343 sunhiĝria (1964) kaj post 4 jaraj riparadoj laŭ sama stilo kaj arkitekturo, la pordoj malfermiĝis al entuziasmo de sia vizitantoj.

La nova konstruaĵo estas unu kaj duon etaĝa kies skeleto estas el ferbetono kaj la fasado el tiu Ĥalaĝ-ŝtono de Maŝhado kiu estis uzita en unua konstruaĵo.
Ankaŭ novan bulvardon de envena vojo de Tuso ĝis la ĝardeno de la maŭzoleo samtempe vojfariĝis, subkies eble la restaĵoj de la malnova Tuso (Taberano) povas ekzisti.
La aliaj vidindaĵoj de Tuso estas:
- Malnova remparo aŭ Tus-citadelo.
- Harunia monumeto.
- Historiaj pontoj de Kaŝf-rivero.
- Tur-forma maŭzoleo.
- La pordegoj de Tuso inkluzive: Rudbar, Marv, okcidenta kaj nordorienta pordegoj.
- "Paĵ" naskiĝvilaĝo de Ferdoŭsio.
- Turo Afangan.
- Gilas fonto.

Fotoj de maŭzoleo de Ferdoŭsio en la historia urbo Tuso

Indekso *de la 1-a ĝis la 10-a numero*

personoj

Abbasi. Saed n-ro: 9 p: 20

Abedian. Raana n-ro: 1 p: 9/ n-ro: 2 p: 11

Ahmad Nia. Ŝirin n-ro: 4 p: 3, 4 / n-ro: 5 p: 11 / n-ro: 6 p: 18 / n-ro: 7 p: 9 / n-ro: 10 p: 29

Aĥteh. Gasem n-ro: 9 p: 13

Akerlund. Ann-louise n-ro: 1 p: 7

Aleksandro la granda n-ro: 10 p: 10

Alizadeh. Hosejn n-ro: 8 p: 18 / n-ro: 10 p: 24

Arakelijan. Karine n-ro: 10 p: 21

Attar Nejŝaburi. Farid-od-din n-ro: 8 p: 9

Azarhushang. Gholam Reza n-ro: 2 p: 4, 5 / n-ro: 6 p: 23 / n-ro: 10 p: 29

Bahmean Reĝo n-ro: 4 p: 5

Baranowicz. Halina n-ro: 2 p: 3

Bastani. Ŝima n-ro: 10 p: 9

Borhani. Said n-ro: 6 p: 17 / n-ro: 10 p: 3, 29

Camus. Albert n-ro: 10 p: 13

Corsetti. Renato n-ro: 1 p: 3 / n-ro: 4 p: 34

Dolatŝahi. Ali Reza n-ro: 2 p: 3 / n-ro: 2 p: 7

Durono. F.V n-ro: 2 p: 4

Durwael. Ivo n-ro: 9 p: 24

Ebrahimpur. Najjere (Lumina) n-ro: 4 p: 32 / n-ro: 7 p: 29 / n-ro: 9 p: 20 / n-ro: 10 p: 24, 26

Elbakjan. Lida n-ro: 10 p: 21

Emrani. Simin n-ro: 1 p: 14 / n-ro: 4 p: 32 / n-ro: 7 p: 4, 7 / n-ro: 9 p: 22 / n-ro: 10 p: 3, 29

Fahmi. M n-ro: 2 p: 10 / n-ro: 3 p: 9 / n-ro: 5 p: 21 / n-ro: 7 p: 19 / n-ro: 8 p: 9, 24 / n-ro: 9 p: 17 / n-ro: 10 p: 27, 28

Ferdoŭsio. Abolghasem n-ro: 2 p: 9 / n-ro: 3 p: 8 / n-ro: 4 p: 5 / n-ro: 10 p: 19

Ĝalali. Bijan n-ro: 2 p: 6

Ĝamŝid (reĝo) n-ro: 10 p: 5, 9

Gasemi. Reza n-ro: 10 p: 13

Gurgen. Sevak n-ro: 10 p: 20

Habibpur. M. P. n-ro: 3 p: 6,7 / n-ro: 10 p: 21

Hafezo n-ro: 3 p: 8 / n-ro: 9 p: 6

Ĥajjam. Omar n-ro: 8 p: 17 / n-ro: 10 p: 9

Ĥejrĥah-Vatan. Nasim n-ro: 2 p: 10

Hiroyuki. Takashi n-ro: 2 p: 4

Hosejni. Mehrzad n-ro: 8 p: 24 / n-ro: 9 p: 24

Ibne-Haŭgal n-ro: 4 p: 5

Kabiri. Hamid Reza n-ro: 6 p: 20

Kajjam. Omar Ref al Ĥajjam

Kapista. Tereza n-ro: 7 p: 25 / n-ro: 8 p: 10 / n-ro: 9 p: 25

Karam Nejad. Anahita n-ro: 6 p: 20

Karimi. Azar (Zahra) n-ro: 2 p: 4 / n-ro: 3 p: 10 n-ro: 10 p: 29

Karimi. Diana n-ro: 6 p: 22 / n-ro: 10 p: 29

Karimi. Mehdi n-ro: 6 p: 7

Kenzaburo. De oe n-ro: 2 p: 4

Kheyr khah. Reza n-ro: 2 p: 4 / n-ro: 4 p: 13

Kosari. Ali n-ro: 10 p: 5

Lins. Ulrich n-ro: 2 p: 3

Mahbub. Asad n-ro: 4 p: 5 / n-ro: 5 p: 2 / n-ro: 6 p: 2, 15 / n-ro: 7 p: 21 / n-ro: 8 p: 13 / n-ro: 9 p: 3 / n-ro: 10 p: 13

Maĥmalbaf. Mohsen n-ro: 3 p: 3 / n-ro: 7 p: 7, 8

Mamduhi. Ahmad Reza n-ro: 3 p: 5 / n-ro: 4 p: 8 / n-ro: 5 p: 4, 7 / n-ro: 6 p: 14, 24 / n-ro: 7 p: 2, 12 / n-ro: 8 p: 6, 25 / n-ro: 9 p: 9 / n-ro: 10 p: 29

Mamduhi. Behĝat n-ro: 7 p: 11 / n-ro: 8 p: 17

Manuĉehrio n-ro: 3 p: 8

Marcoval. Joaquim n-ro: 3 p: 13

Markarian. Martin n-ro: 6 p: 16

Masayuki. Saionji n-ro: 2 p: 4

Melnikov. Aleksandr. S n-ro: 5 p: 16

Michiko.Takaoka n-ro: 4 p: 13

Miler. Artur n-ro: 2 p: 4

Mirbagian. Morteza n-ro: 1 p: 8 / n-ro: 3 p: 2 / n-ro: 4 p: 2 / n-ro: 5 p: 2 / n-ro: 8 p: 2 / n-ro: 9 p: 2 / n-ro: 10 p: 2

Mohammadi. Rostam n-ro: 6 p: 21

Mohebali. Homejra n-ro: 10 p: 28

Molnar. Deferenc n-ro: 2 p: 4

Mosaddeg. Hamid n-ro: 9 p: 20

Musavizadeh. Lejla n-ro: 8 p: 24

N. Maĝd. Fariba n-ro: 1 p: 2 / n-ro: 3 p: 2 / n-ro: 6 p: 13 / n-ro: 7 p: 4, 8 / n-ro: 8 p: 5 / n-ro: 9 p: 23 / n-ro: 10 p: 29

Nezamio n-ro: 3 p: 8

Nimajuŝiĝ n-ro: 8 p: 3

Pakravan n-ro: 2 p: 9

Pandĥahi. Tahere n-ro: 8 p: 24

Partovi Nia. Vahid n-ro: 10 p: 29

Phillipson. Robert n-ro: 1 p: 3

Platteau. R n-ro: 10 p: 18

Privat. Edmond n-ro: 2 p: 3

Purdehgan. Ali n-ro: 10 p: 25

Raŝidi. Hejdar n-ro: 5 p: 3, 10 / n-ro: 10 p: 25

Rudakio n-ro: 3 p: 8

Sadio n-ro: 3 p: 8 / n-ro: 5 p: 10 / n-ro: 6 p: 3, 19 / n-ro: 7 p: 18 / n-ro: 8 p: 21 / n-ro: 9 p: 21 / n-ro: 10 p: 22

Ŝafii. Hamze n-ro: 5 p: 2, 22 / n-ro: 8 p: 29 / n-ro: 9 p: 18, 29 / n-ro: 10 p: 8, 29

Sahebzamani (MHSZ) n-ro: 10 p: 3

Sajjadpur. Kejhan n-ro: 1 p: 4, 5 / n-ro: 2 p: 2 / n-ro: 3 p: 8 / n-ro: 4 p: 12 / n-ro: 5 p: 10 / n-ro: 6 p: 3, 19 / n-ro: 7 p: 3, 17, 18 / n-ro: 8 p: 18, 20, 21 / n-ro: 9 p: 6, 7, 12, 21 / n-ro: 10 p: 2, 4, 19, 29

Ŝamlu. Ahmad n-ro: 9 p: 29

Ŝapur. Parviz n-ro: 8 p: 17

Sardari. Said n-ro: 10 p: 3

Ŝariati. Nafise n-ro: 10 p: 29

Sepehri. Sohrab n-ro: 4 p: 8

Ŝelstajn. Silvester n-ro: 2 p: 4

Skutnabb- Kangas. Tove n-ro: 1 p: 3

Solat. Nazi n-ro: 4 p: 32 / n-ro: 6 p: 7, 12, 21 / n-ro: 7 p: 4

Torabi. M.R n-ro: 5 p: 23 / n-ro: 7 p: 4 / n-ro: 8 p: 3 / n-ro: 10 p: 21, 29

Vahidi. Hosejn n-ro: 1 p: 14

Valla. Marie n-ro: 5 p: 14

Vindschadier. Brian n-ro: 3 p: 2

Vinyals. Manel n-ro: 3 p: 13

Waringhien. Gaston n-ro: 10 p: 9

Westermayer. Manfred n-ro: 2 p: 8

Zakrzewsi. Adam n-ro: 2 p: 3

Zokzi. Abdol-Rahman n-ro: 6 p: 23 / n-ro: 7 p: 4, 5

Zolfagar Nia. Golam n-ro: 10 p: 25

organizoj

AFESPO n-ro:10 p:29

Akademio de Sciencoj de Armenio n-ro:10 p:20

Armenia E-a Asocio (AEA) n-ro:10 p: 21

Ferdoŭsi Universitato n-ro:10 p:29

IJK n-ro:1 p: 4

ILEI n-ro:10 p: 3

Irana E-o Asocio (IREA) n-ro:10 p: 3, 29

Irana E-o Centro n-ro:1 p: 4

Irana verkista asocio (IVA) n-ro:2 p:4

IREJO n-ro:1 p: 4 / n-ro:4 p:32, 34 / n-ro:10 p: 3, 29

IRLEI (Irana ligo de e-aj instruistoj) n-ro:10 p:3, 29

IRANA ESPERANTISTO

Pajam-e Sabzandišan

N-ro: 11 Jaro: 4 Printempo 2005 *Kultura sezon-revuo en la persa kaj Esperanto*

Irana Kino